

*Revuo*  
**ESPERANTO**  
*Internacia*


---

---

N-ro 588 (11)    NOVEMBRO 1954

---

---



**Bailey Ponto super Rivero Steel, Ontario, Kanado**  
(Laŭ afabla permeso de Dept. of Highways, Registaro de Ontario)  
(Vidu paĝon 299)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB

Jara abono (1955) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Ĉion por la redakcio sendu al  
ESPERANTO  
Palais Wilson, Genève, Svis.  
Urgajn informojn sendu rekte  
al Rickmansworth

Tarifo por reklamoj :

|                |                |
|----------------|----------------|
| 1 paĝo £6      | ½ paĝo £3      |
| ¼ paĝo 30 ŝil. | ⅓ paĝo 15 ŝil. |

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-  
kupono por ĉiu duo da vortoj

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la  
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,  
anoncetoj sendu al  
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Legantoj en 80 landoj  
Eldonnumero 6000



Enhavo

|                                                                                 |      |
|---------------------------------------------------------------------------------|------|
| Specialaj artikoloj :                                                           | paĝo |
| La Bulonja Deklaracio : <i>Hans Jakob</i> .. .. .                               | 281  |
| D-rino Wanda Zamenhof .. .. .                                                   | 284  |
| Vivu la Solidareco : <i>La Prezidanto</i> .. .. .                               | 289  |
| Esperantista sekcio en Internacia Eŭkarista Kongreso : <i>D-ro J. B. Kao</i> .. | 290  |
| Pactempa Utiligo de Militmaterialo—La Bailey Ponto : <i>W. H. Coventry</i> ..   | 299  |
| La Termitoj—blankaj formikoj : <i>Ernest Paul</i> .. .. .                       | 301  |
| Bolonjo—Unuaj Impresoj : <i>Mason Stuttard</i> .. .. .                          | 304  |
| Eĥoj de la Haarlema Kongreso .. .. .                                            | 305  |
| Belartaj Konkursoj de UEA :                                                     |      |
| 1954 (Poezio originala) : Antaŭ Spegulo : <i>Eli Urbanová</i> .. .. .           | 296  |
| Premsonĝo : <i>Claude Piron</i> .. .. .                                         | 296  |
| (Poezio traduka) : Leprulo : <i>Hans Seerdorff</i> (trad. <i>Poul Thorsen</i> ) | 297  |
| 1955 : informoj .. .. .                                                         | 310  |
| Prozo :                                                                         |      |
| La Kuracisto de Lennox : <i>A. J. Cronin</i> .. .. .                            | 307  |
| Konstantaj rubrikoj :                                                           |      |
| Enigma Konkurso .. .. .                                                         | 306  |
| Internacia Konkurso .. .. .                                                     | 312  |
| Nia Forumo .. .. .                                                              | 295  |
| Niaj Mortintoj .. .. .                                                          | 283  |
| Oficiala Informilo .. .. .                                                      | 311  |
| Radio kaj Esperanto .. .. .                                                     | 298  |
| Tra la Libraro .. .. .                                                          | 291  |
| Tra la Mondo Esperantista .. .. .                                               | 285  |



# Revuo

# ESPERANTO

## Internacia

N-ro 588

Novembro 1954



## La Bulonja Deklaracio

EN Bulonjo-ĉe-Marŝo 1905 konstituiĝis la Esperanto-Movado, ĝis tiam senforma aro da idealistoj, disigitaj en dudek landoj. La samideanoj kunvenintaj tiam havis antaŭ si taskon kolosan, por kio mankis al ili ĉia ekzemplo ; la efemera Volapük-eksperimento, pli blufa ol reala, ne povis servi kiel tia.

Lingvo, organizo, propagando, literaturo, ĉio postulis fundamenton sur kiu oni povos konstrui poste. La dokumentoj submetitaj tiam al la kongresanoj abundas je proponoj pri organizo kaj aliaj malpli urĝaj taskoj. Antaŭ ĉio urĝis formuli klare kaj precize la sencon de l'Esperantismo. Post varmaj diskutoj, kiuj pruvis jam la esprimpovon de la juna lingvo, surmondiĝis la fama

### DEKLARACIO PRI ESPERANTISMO

konata al ni kiel la Bulonja Deklaracio. La nomo de tiu ĉi urbo estas eterne ligata al nia movado kaj eble *iam* oni starigos tie ian marmoran memoraĵon pri tiu ĉi evento.

La Bulonja Deklaracio konkretigas iamaniere la vortojn de la Antaŭparolo al la *Fundamento de Esperanto*. Unueco de la lingvo tia kia ĝi estas, unueca ideo pri la karaktero kaj la celo de la ekestiĝanta movado, jen konciza difino de la du dokumentoj.

Kia konvinko speguliĝas en tiu ĉi deklario? Kiom firma estis la kredo de la redaktintoj kaj de la akceptanta kongreso pri la forto de la ekzemplo kiun ili donis? Ekzemplo instruas laŭdire. La ekzemplo, ke estas eble *krei* lingvon, *funkciigi* ĝin kaj ĉefe, sin komprenigi, tion montris niaj kongresoj, nia tuta ekzisto. Montriĝas tamen, ke ne sufiĉas la konvinko de idealistoj por alta celo, nek la *pruvo* de kelkdekjara uzado de la lingvo, por igi ĝin ĝenerale rekonata kaj uzata. Neniu el la kongresanoj en 1905 supozis, ke jardekojn poste, la eminentuloj kiuj gvidas la ŝtataferojn, estos akompanataj de interpretistoj kiuj transdonos la parolojn de unu al alia gravulo, en la respektiva lingvo. La Franca lingvo, tiu ĉi rafinita ilo de same rafinita diplomataro de pasinta tempo, cedis lokon al la naciaj idiomoj. Ŝanĝiĝis la homoj kaj ŝanĝiĝis la iloj. Neniu ankaŭ eĉ supozetis nur, ke ekzistos aparatoj por transigi individue tradukon tujan de paroloj en kunvenoj.

Analizante la deklaron oni konstatas ke ĝi respondas kvin demandojn :

Kio estas Esperantismo ?

Kial Esperanto ?

Kiu estas mastro de la lingvo ?

Kio estas la Fundamento ?

Kio estas Esperantisto ?

Atente legante la unuaneron de la deklaro oni konstatas, ke la tempo surpasis la tiaman revon. Kiel baza dokumento de nia movado la Deklaracio restos, sed necesas ke nova deklaro, kiu respondas al la nuna situacio, tiom lingva kiom politika, precizigu nian starpunkton. Ni konas diversajn formojn de milito, la klasikan per armiloj, la novan, tielnomatan nervan aŭ malvarman militon. Al ĝi oni aldonu alian ; la militon inter grandaj kulturlingvoj ligataj al nova formo de imperialismo. Tiun ĉi situacion nova deklaro devos montri kaj la rolon kiun plenumas la internacia sendependa kaj senpretenda lingvo internacia ESPERANTO.

*Hans Jakob.*

## DEKLARACIO PRI ESPERANTISMO

Akceptita en la unua Universala Kongreso de Esperanto

(Boulogne-sur-Mer. Aŭgusto 1905)

Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso Esperantista en Bulonjo-apud-Maró, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon :

### **Kio estas Esperantismo ?**

1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu "ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn", donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povas esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.

### **Kial Esperanto ?**

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj faritaj en la daŭro de la lastaj du centjaroj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivpova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la lingvo internacia konsciante, ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.



## Kiu estas mastro de la lingvo ?

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn, rilate la lingvon, tial Esperanto estas “nenies propraĵo”, nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj ; kiel spiritaj mastroj de tiu lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

## Kio estas la Fundamento ?

4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniun aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia Esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniun devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo “Fundamento de Esperanto”, en kiu neniun havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povos pravigi sin per la vortoj “tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto”. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la “Fundamento de Esperanto”, ĉiu Esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo, al ĉiuj Esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

## Kio estas Esperantisto ?

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo Esperantista por ĉiu Esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

### Niaj Mortintoj

Ni kun ĉagreno eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

**Collier.** La 17an de aŭgusto ĉijara mortis S-ro T. E. Collier el Kendal, Anglujo, multjara membro de UEA.

**Fortey.** Nia Dumviva Membro F-ino I. C. Fortey, el Leicester, Anglujo, mortis la 16an de oktobro, je aĝo 91.

**Grosso.** Per tragika trafikakcidento dum ferio mortis S-ino Adele Grosso, el Carrara, Italujo, la 8an de aŭgusto.

**Shawcross.** La 23an de aŭgusto mortis nia membro S-ro F. H. Shawcross el Manchester, Anglujo.

**Tattersall.** 30 jarojn Esperantisto kaj gvidanto de la movado en norda Anglujo, S-ro Harold Tattersall, el Leeds, mortis je aĝo 64, la 23an de aŭgusto.

# D-rino Wanda Zamenhof

La nekrologo aperinta en la Oktobra numero ne citas detalojn el la turmenta vivo de la bofilino de la Majstro. Sekvantaj linioj ricevitaĵ nur la 19-an de Septembro forigas tiun-ĉi mankon. *(Redakcio)*

Doktorino Wanda Zamenhof de domo Frenkel, naskiĝis la 19.7.1893 en Varsovio, kiel filino de varsovia kuracisto.

Medicinajn studojn, komencitajn en Lousanne daŭrigitajn en Moskvo kaj Krakovo ŝi finis en Varsovio en la jaro 1922.

La 17.5.1923 ŝi edziniĝis kun D-ro Adam Zamenhof; en la jaro 1925 ŝi naskis filon, Ludovikon.

De la jaro 1922 ĝis 1939 Wanda Zamenhof laboris kiel okulkuracisto en sanservado de la urbo Varsovio, en la urba malsanulejo (en apartaĵo gvidata de ŝia edzo), en socia malsanulkaso kaj krome en la ambulatorio ĉe la strato Zamenhofa, fondita iam de la Majstro.

Tuj ĉe la komenco de la dua mondmilito, kvar tagojn post la enmarŝo de la germanoj en Varsovion, ŝi estis malliberigita kiel ano de la Zamenhofa familio kune kun Adam, Zofia kaj Lidia Zamenhof kaj ŝia bofrato Henryk Minc.

En januaro 1940 Adam Zamenhof kaj Henryk Minc estis mortpafitaj kiel unuaj viktimoj de la Hitlera teroro en Pollando. Wanda Zamenhof malliberigita kune kun ambaŭ filinoj de la Majstro en la malliberejo "Paviak" (kvazaŭ por ironio situata kelkcent metrojn de la domo de la Majstro ĉe Zamenhofa strato), revenis hejmen post ses monatoj de mallibereco. Tamen post kelkaj monatoj ŝi denove reiris al malliberejo, tiun ĉi fojon al la amasmalliberejo, kiun la germanoj fondis en Varsovio sub la nomo de hebrea *ghetto*. En 1942, dum la germanoj amase mortigadis la polajn judojn, ŝi kune kun la filo

trapasis la murojn de ghetto kaj devis kaŝi sin kontraŭ la mortverdikto en la ĉirkaŭo de Varsovio sub la Kaŝnomo Zaleska.

Kiam la ruĝa armeo liberigis Pollandon Wanda Zamenhof tuj revenis al sia faka laboro.

Jam komence de Marto 1945 ŝi reprenis en la komplete detruita Varsovio sian postenon de socia kuracisto. La urbopartoj kie ŝi laboris antaŭ la milito ne plu ekzistis, ŝi devis ĉion rekomenci; ŝi fervore laboris por rekonstrui la publikan kuracservadon en la urboparto Mokotów, kie ŝi ekloĝis. Dum preskaŭ dek jaroj ŝi laboris seninterrompe en la urba ambulatorio Mokotów.

Ĉiuj loĝantoj de la urboparto ŝin konis kaj amis, ne nur kiel kuraciston, sed kiel ĉiam helpantan amikon. Kaj tie, antaŭ sia laborposteno, kiam ŝi trapasis la straton, rapidante kun helpo al malsanulo, ŝi finis sub la radoj de ŝargautomobilo sian laboreman vivon.

Ŝia eco ĉiam estis modesteco. Ŝi volis efektive labori kaj doni helpon; neniam ŝi ŝatis brilon. Ŝi estis fervora adepto de la interna ideo de Esperanto.

Ŝi amis la homojn kaj estis de ili amata.

---

La menciita akcidento okazis la 30an de julio kaj la funebra ceremonio okazis sur la milita tombejo la 3an de aŭgusto.

La sekretario de la Ĉefa Estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando en la nomo de polaj esperantistoj metis florkronon kaj adiaŭis doktorinon Wanda Zamenhof.





# ***Tra la Mondo Esperantista***



## **Ĉeĥoslovakujo**

Kiel ĉiujare ankaŭ en 1954 okazis Somera Kolegio en Doksy, kiun partoprenis 80 kursanoj. Gvidis la kolegion D-ro Pitlik, instruis 6 instruistoj. Ligita al tiu ĉi aranĝo estis la sesa belarta konkurso "Floraj Ludoj". Fondita en 1946 la kolegion vizitis ĝis nun 1460 lernantojn. *H.J.*

## **Hispanujo**

Dum la venonta monato Decembro, Madrida Esperanto-Klubo prezentos al la publiko de la hispana ĉefurbo Ekspozicion de la Esperanto-Libro en salono de la Palaco de la Nacia Biblioteko. La graveco de ĉi tiu

ekspozicio estas facile komprenebla: tuj post la decido de UNESKO pri Esperanto — kia ajn ĝi estos — la hispanaj esperantistoj intencas aranĝi imponan demonstracion pri la taŭgeco kaj disvastigiteco de nia lingvo. En tiu altranga kadro de la unua hispana biblioteko, gravaj eminentuloj de la hispana kultura mondo povos esti trafataj per tia propagando kaj alligataj al nia movado.

Ni bezonas elmontri multajn kaj gravajn verkojn eldonitajn en aŭ pri Esperanto, kaj tial ni petas vian bonvolan helpon, pruntesendante al ni kelkajn Esperanto-librojn, kiuj laŭ via opinio meritas esti ekspoziciataj,



*La Somera Kolegio en Doksy, Ĉeĥoslovakujo*



antikvaj aŭ modernaj. Ni klarigas al vi, ke ĉiuj libroj estos elmontrataj en vitrinoj kaj vitroŝrankoj fermitaj, do, ili ne povos esti foliumataj de la publiko, kaj tiel ni evitos difektigojn.

Vi povas sendi vian pruntedonaĵon al Sinjoro Joaquín López Herrero, str. Conde de Penalver 52, Madrid, Hispanujo. Tuj post la ricevo, ni sendos al vi kvitancon de la libroj pruntitaj, kun indiko de titolo, aŭtoro kaj ekzempleroj. La libroj estos resendataj al vi je niaj kostoj, per rekomendita poŝto, dum la monato kiu sekvos post la fermo de la Ekspozicio. Via helpo estos rekompencata, ĉar ni sendos al ĉiu helpanto belan plurkoloran afiŝon pri la ekspozicio.

La 15a Hispana Esperanto-Kongreso kunigis preskaŭ 400 reprezentantojn de ĉiuj hispanaj regionoj kaj pluraj aliaj landoj. Oficiala akcepto de la urbestro, Sankta Meso kun Esperantlingva prediko, pluraj fakaj kunsidoj kaj ekskursoj plenigis la kvar-tagan kongreson, sed apartan mencion meritas la Literatura Vespero, dum kiu oni deklamis prozon kaj poezion, kaj originalan kaj tradukan. Venkintoj (el 4 landoj) en Literatura Konkurso ricevis entute ok premiojn pro siaj altnivelaj verkoj. Tiun saman vesperon okazis la Oficiala Bankedo kaj poste Folkloro Festo, kun popolkantoj kaj popoldancoj. por gimnazianoj, en kies programo

### Norvegujo

Prelegvojaĝo de docento S. Pragano en Norvegujo.


Dum sia prelegvojaĝo en Svedujo docento Pragano faris mallongan viziton ankaŭ al Norvegujo, kie li prelegis en Oslo kaj Trondhejmo. Klubo Esperantista en Oslo aranĝis la 27an de aŭgusto propagandvesperon

partoprenis i.a. Sinjoro Pragano per provleciono. La 28an kaj 29an de aŭgusto la Klubo aranĝis prelegserion de 6 prelegoj, al kiu estis invititaj ĉiuj Esperantistoj en Oslo. Docento Pragano prelegis trifoje pri diversaj temoj. La 31an de aŭgusto docento Pragano prelegis en la Grupo Esperantista de Trondhejmo pri du temoj.

### Svedujo

Antaŭ jaro ekestis ideo en la klubo "La Aglo," Karlskoga, pri internacia montrado de infandeseĝnaĵoj. Inter la 4a kaj 12a de septembro la klubo helpe de multaj internaciaj kontaktoj realigis la ekspozicion kun la rezulto: infandeseĝoj el 20 landoj, kaj 6,693 vizitantoj.


Estis grandega propagando: artikolojn ĝis kvinkolonaj ni ricevis en la plej grandaj svedaj gazetoj, krome bonegan ekonomian rezulton. La klubo nun dankas al ĉiuj kiuj sendis desegnojn, al la internacia esperantogazetaro, al la delegitoj kaj aliaj esperantistoj kiuj bonvole helpis. Oni ankaŭ devas mencii la lokan gazeton "Karlskoga Tidning" kaj ĝian ĉefredaktoron, kiuj grand-skale kaj objekte informis pri la ekspozicio kaj la lingvo. Nun la ekspozicio estos migranta. Ĝi jam



*Bildoj el Japanujo*



estas mendita por 13 urboj en Svedujo. Tie la aranĝoj ĉiam funkcias kune kun gazetoj kaj ni kalkulas ke minimume 40,000 ĝis 50,000 personoj vidos ĝin. Baldaŭ ĉiuj infanoj kiuj estas aprobataj de la speciala arta komitato ricevos diplomojn, kaj la 4 plej bonaj en ĉiu aĝogrupo de 6 ĝis 14 jaroj ricevos premiojn (entute 36 infanoj).



*Bildoj el Nov-Zelando*

### **Internacia Fervojista Kongreso**

La 7a Kongreso de Internacia Fervojista Esperantista Federacio okazos de 8a ĝis 13a de majo 1955 en Zürich (Svislando). LKK de la plej granda faka kongreso, uzanta Esperanton (ĉiujare 400–600 kongresanoj), invitas la Esperantistaron al partopreno.

Programo: Interkonatiĝa vespero, Solena Malfermo, Fakaj Prelegoj, Fakaj Ekskursoj, Virinaj Ekskursoj, Filmvespero, Ekskurso sur Lago de Zürich, Urbrondveturado, Folkloro Vespero, Postkongresa Vojaĝo.

Kongres-kotizo: sv.fr. 18.—. Ĉiu Esperantisto estas akceptata kiel kongresano. Simpatianto esprimas sian simpatian kaj subtenon per kotizo de fr. 5.— kaj ricevos kongreslibron kaj insignon. Aliĝilo kun

mendilo por ekskursoj, manĝado kaj loĝado ricevebla de O. Walder, ĉefdelegito de UEA, Eigenheim, Romanshorn, Svislando.

### **Esperanto ĉe la Eks-Studentoj de Superaj Komercaj Lernejoj**

En Lyon, Francujo, okazis komence de julio 1954 internacia kongreso de la Asocioj de Eks-Studentoj de Superaj Komercaj Lernejoj. La tuta kongreso estis dediĉita al la praktika organizado de internacia kunlaboro de tiuj asocioj.

Unu el la punktoj de tiu programo estis la lingva demando. Du raportoj estis prezentataj: unu de S-ro Nordqvist el Stockholm, kiu proponis la uzadon de Esperanto, la alia de S-ro Marchal, el Liège, kiu sugestis la internacian uzadon de la angla lingvo.

La Komisiono de la lingva demando estis prezidata de Richard Levin, prezidanto de la Eks-Studentoj de la Sup. Kom. Lernejo de Lyon, kaj ankaŭ prezidanto de la Esperantista Societo de la sama urbo. S-ro Nordqvist, membro de la komitato de la Internacia Federacio de Eks-Studentoj de Sup. Kom. Lernejoj, ĉeestis la solenan malfermon de la kongreso (dum kiu Richard Levin bonvene salutis la kongresanojn en diversaj lingvoj, ne forgesante Esperanton). Sed li ne povis ĉeesti la specialan kunvenon dediĉitan al la lingva demando.

La diskutado montris, ke la partoprenantoj preskaŭ nenion scias pri Esperanto, kaj nutras kontraŭ ĝi la bonekonatajn antaŭjuĝojn. Richard Levin penis kontraŭbatali tiujn antaŭjuĝojn kaj fine sukcesis akceptigi, ke la demando estu plue studata kaj enskribita en la tagordon de la venonta kongreso, kiu okazos en 1956 en Romo, Italujo.

Ĉiu asocio estis petata esplori la aferon kaj sendi siajn sugestojn al Richard Levin, kiu kompilos la respondojn kaj prezentos raporton al la estonta kongreso. Estas do konsilinde, ke la Esperantistaj societoj rilatu kun la Asocioj de Eks-Studentoj de Sup. Kom. Lernejoj por informi ilin pri Esperanto. La Esp-societoj, kiuj bonvolas helpi, estas petataj informi Richard Levin, 55 avenue Félix Faure, Lyon (Rhône), Francujo.

### Blinduloj

LIBE apelacias al via helpo !

La Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj celas :

- (a) propagandi la praktikan uzadon de Esperanto inter la tutmonda blindularo ;
- (b) instigi la naciajn blindulinstitutojn al instruado pri Esperanto ;
- (c) sur bazo de la gefrateco unuigi la blindulojn en la tuta mondo, por ke ili komunforte povu aspiradi al sort-plibonigo ;
- (d) pligrandigi sian Internacian Esperanto-braĵlan Bibliotekon pere de esperantlingva literaturo kaj prunte disponigi ĝin al la blindul-esperantistaro.
- (e) aranĝi ĉiujarajn internaciajn kongresojn en la kadro de UEA-kongresoj.
- (f) reprezenti la tutmondan blindularon dum oficialaj okazoj.

Por efektivigi ĉion ĉi la Ligo bezonas monon, sed pro tio, ke la blindul-esperantistaro relative estas malgranda kompare al la vidul-esperantistaro, la Ligo ne disponas pri sufiĉe da financaj rimedoj por efektivigi ĉion. Pro tio LIBE kuraĝas ĝentile peti fincan helpon al vi, niaj vidulaj samideanoj.

Tiuj, kiuj bonvolas finance subteni LIBE-on, povas fari tion, ĉu sendante

ĉekon aŭ respondkuponojn rekte al la kasisto de LIBE, S-ro Alb. Baerveldt, Schippersstraat 31, Rotterdam, Nederlando, aŭ pere de la pagservaj delegitoj de LIBE : Britujo : S-ro P. Wallace, 52 Westacres Crescent, Newcastle-on-Tyne 5 ; Danlando : S-ro Poul Glygaard, Gröndahlssvänge allé 72, Köbenhavn O ; Finnlando : S-ro Oskari Lehtivaara, Aleksis-Kivenkatu 22, Helsinki ; Francujo : S-ro Raymond Gonin, 7 rue des Platanes, Lyon III ; Germanujo : Joseph Kreitz, (22c) Köln-Ehrenfeld, Philipsstrasse 67 ; Hispanujo : S-ro Dámaso Mielgo, Calle Antonio Trueba 8, Ses tao (Vizcaya) ; Italujo : S-ro G. Vassio, Corso Giulio Cesare 118, Torino 813 ; Svedujo : S-ro Harald Thilander, Stocksund.

\* \* \*

La lernejo Hadley por Blinduloj, Winnetka, Illinois, Usono, nun havas 29 studentojn de Esperanto—24 en Usono kaj unu en ĉiu el la jenaj landoj : Ekvadoro, Jugoslavio, Grekujo, Italujo, Nederlando. Esperanto estas unu el 76 hejmsstudaj kursoj donataj al la blinduloj de la Lernejo Hadley—ĉiu en brajlo kaj ĉiuj haveblaj al la blinduloj senkoste.

### Esperanto laŭ Kvakera opinio

S-ro Alfred G. Tucker, membro de la Societo de Amikoj (Kvakeroj) kiu partoprenis kiel delegito en la tutmonda pacifista Konferenco okazinta antaŭ nelonge en Japanujo, skribis la jenan leteron al la anglalingva semajna gazeto kvakera "The Friend" (numero de 6.8.54) :

### La valoro de Esperanto

Pluraj amikoj petis informon pri la lingva problemo ĉe la Tutmonda Pacifista Konferenco ĵus okazinta en Japanujo. Eĉ ne unu el la transmaraj delegitoj scipovis sufiĉe la japanan



# Vivu la Solidareco

**A**NTAŬ unu jaro UEA apelaciis al la esperantista mondo kunhelpi por taŭge prezenti nian lingvon al la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo. Nia alvoko rezultis je ĝenerala apogo, kaj de la esperantistaj asocioj, kaj de la unuopaj esperantistoj.

Unuflanke la landaj asocioj faris bonegan laboron por kolekti ampleksan materialon pri nia lingvo en la diversaj landoj. Aliflanke la unuopuloj ĉie en la mondo donacis monon por ebligi al UEA reprezentiĝi ĉe la konferenco.

Estas mia kara devo esprimi al ĉiuj kontribuintoj sinceran dankon de UEA. En multaj landoj oni kun alta entuziasmo entreprenis la kolektadon. Ekzemple en Svedlando, kie ne malpli ol proksimume 1,000 donacintoj troviĝas malantaŭ la mallonga raporto de nia revuo: "SEF £279". Sed ankaŭ en aliaj landoj oni atingis altajn ciferojn. Kaj vere kortuŝa estas la gesto de la polaj esperantistoj, kiuj—ĉar ili ne povis sendi kontantan monon—faris sian kontribuon en formo de libroj, kiujn ni vendis kaj tiel ricevis monon.

Sed ankaŭ alimaniere la esperantistoj montris sian solidarecon. Por ke la delegitoj de la UNESKO-konferenco povu ricevi konkretan bildon pri la atingitaj rezultoj de Esperanto, estis decidite aranĝi en Montevideo la Unuan Universalan Esperanto-Ekspozicion. Laŭ la raportoj, kiujn mi ricevis de la kuraĝaj kaj gratulindaj organizintoj, mi konstatas, ke la esperantistoj malavare kaj ofere donacis abundan materialon, por ke la ekspozicio estu kiel eble plej grandioza. Mi sincere gratulas ĉiujn donacintojn.

Vere, mi fieras pri la solidareco de la esperantista popolo. Ĝi pli kaj pli similas al juna nacio, kiu batalas—tamen sen kanonoj kaj atombomboj—por defendi sian pozicion kaj por venki en la milito por la liberiĝo el la lingva ĥaoso.

En la momento, kiam vi legos tiujn ĉi vortojn, la UNESKO-konferenco jam komenciĝis. Mi transdonas al D-ro Lapenna, kiu tiel brile reprezentis nin jam en la UNESKO-konferenco antaŭ du jaroj, kaj al lia kunreprezentanto D-ro Fernández-Menéndez, la plej sincerajn bondezirojn en ilia grava tasko en Montevideo.

E. MALMGREN,  
*Prezidanto de UEA.*

**Tra la mondo : *fino*.**

lingvon, por uzi ĝin utile, sed niaj japanaj amikoj disponigis interpretistojn kiuj baraktis heroe kun la malfacilaĵoj de la angla lingvo.

Laŭ miaj personaj spertoj, tamen, estis multe pli facile konversacii kaj diskuti pri delikataj punktoj en Esperanto ol en Angla lingvo. Ĉiukaze la japanaj amikoj uzis normalan elparolon de la internacia lingvo kaj niaj debatoj estis tute klaraj kaj sen ia miskompreno.

Tuj kiam ni ekprovis uzi la Anglan, grandaj prononcaj malfacilaĵoj malhelpis min kompreni, ĝis mi petis plurfoje ripetadon.

Mi pli kaj pli konvinkiĝas pri la neceso uzi Esperanton ĉe ĉiuj internaciaj konferencoj samkiel por personaj rilatoj.

**Pastro Doktoro**

**Johano Baptisto Kao, O.F.M. :**

## **Esperantista Sekcio en Internacia Eŭkaristia Kongreso**

**L**A Eklezio Katolika en Brazilo, precipe la ĉefeparĥio de Rio de Janeiro, entuziasme laboras je la preparo de la XXXVI-a Internacia Eŭkaristia Kongreso, kiu devos okazi dum la semajno de la 18a ĝis la 24a de Julio, 1955, en la bela ĉefurbo de Brazilo.

Oni scias ke la Internaciaj Eŭkaristiaj Kongresoj, kiuj jam okazis en multaj landoj, ĉiam prezentis grandan spektaklon de religia fervoro kaj prezentis fratan renkontiĝon de miloj kaj milionoj de katolikaj fideluloj el la tuta mondo. Hodiaŭ la Internaciaj Eŭkaristiaj Kongresoj fariĝis institucio kaj movado de internacia kaj universala graveco.

En 1939, niaj Hungaraj samideanoj, sub gvidado de Kanoniko Pastro Erdey kaj kun la helpo de diverslandaj samideanoj, organizis, unuafoje, la Esperantistan Sekcion en la kadro de la XXXIV-a Internacia Eŭkaristia Kongreso en Budapeŝto. La Sekcio bone sukcesis kaj produktis bonan efekton.

Nun, niaj Brazilaj samideanoj Katolikaj eklaboras kaj klopodas ankaŭ fari la samon en la venonta Eŭkaristia Kongreso. Ili jam faris unuan paŝon ĉe la Nacia Organiza Komitato de la Kongreso kaj akiris ĝian bonvolan aprobon por starigi la "Esperantistan Sekcion". La Ĝenerala Sekretario de la menciita Komitato, Lia Episkopa Moŝto Mons. Helder Camara, ne nur akceptis kaj aprobis la proponon starigi la Esper-

antistan Sekcion, sed ankaŭ promesis tutan sian apogon por la organizo de la Sekcio, kaj li eĉ volas uzi Esperanton kiel unu el la ĉefaj lingvoj (Angla, Franca, Itala, Germana, Hispana kaj Portugala) en la informiloj de propagando pri la Kongreso.

Por efike organizi la Sekcion, fondiĝis la "Loka Komitato Organiza", kiu konsistas el jenaj samideanoj, nome S-ro Johano B. Mello e Souza, S-ro Mário Ritter Nunes, S-ro Eutargio Wanderley, S-ro Arminio de Moraes kaj F-ino Maria Malheiro. La komitato jam komencis prizorgi pri la Esperantista ĥoro por kanti preĝojn kaj himnojn en Esperanto, pri la salono por kunvenoj kaj preĝo por apartaj religiaj funkcioj, pri la kulturaj vesperoj kaj festenoj por bonvenigi la kongresistojn, pri la propagandiloj de la Sekcio, pri la presigo de la Kongreso-Himno kaj aliaj oportunaj preĝoj en Esperanto, kaj pri la fabriko de la Kongresinsigno kun Esperanto-teksto k.t.p.

La Loka Organiza Komitato esperas kaj petas, ke la Esperantistoj Katolikaj de la tuta mondo interesiĝu pri la afero de la Sekcio kaj venu al la Kongreso en granda nombro por montri al la Kongresistoj ne-Esperantistaj, ke Esperanto utilas por la religio, precipe por faciligi la renkontiĝon de diverslandaj samkredantoj en la internaciaj kongresoj kaj kunvenoj. Oni kredas ke la "Esperantista Sekcio" en la kadro de la venonta Eŭkaristia Kongreso antaŭenigos Esperanton kaj ĝian movadon en Brazilo kaj aliaj landoj de Sud-Ameriko.

Por pliaj informoj koncerne la Sekcion, oni skribu al Esperantista Sekcio, Eŭkaristia Kongreso, Palácio São Joaquim, Rio de Janeiro, Brazilo.





# Tra la Libraro

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas ;  
unuope ricevitajn nur mencias.

\*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.  
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

**\*Josip Broz Tito.** Vladimir Dedijer. Biografiaj notoj. Tradukis (el angla lingvo) Mason Stuttard. Ordigis kaj respondecas Petar Zlatnar. 548 paĝoj, bind., ilustrita, kun geografia karto. Eldonis Slovenia Esperanto-Ligo, Ljubljana 1954. Eldonnumero 2000 ; prezo 22ŝ. 6p., aŭfranko 1 ŝil.

Ĉiu jarcento vidas aperi homojn kiujn la sorto levas el la homa formikaro al supro. Ili abundas en nuna jarcento kaj ilia agado grave, eĉ ĝisradike, modifis la socion en la tuta mondo. Nomoj kaj agoj de scienculoj, teknikistoj, politikuloj, militistoj, fine ankaŭ aventuristoj kaj ĉarlatanoj gravuris sin en la memoro de samtempuloj—ofte pli longe ol ili povis elporti. La ŝanĝitaj perceptoj en fiziko, la mirigaj trovaĵoj kemiaj, la kolosaj kreaĵoj teknikaj multgrade timigas pensemulon kaj igas lin demandi : “Kien ci iras, homo ?”

La grandaj perturboj kiujn trapasis la homaro depost 1914 ne estas iaj naturkatastrofoj, sed sekvoj de la homa volo. Precize : de individuoj ! Tro ofte la senforma amaso blinde sekvas ratkaptiston kaj nur tre malofte ia faro, grava en la sekvoj, estas rezultato de rezonado. Tro freŝaj ja estas en la memoro la ekzemploj de tiu ĉi senkritika fervoro, kapabla konstrui sed pli ofte detrui.

Meze de ĉio staras la homo kies volo movigas montojn. Por koni lin la *biografioj* provas alproksimigi la heroon al ni, aŭ diecigante aŭ

homecigante lin. Kiu pro inklino aŭ profesio legas biografiojn pri gvidantoj, je fino de legado estas same malcerta en la juĝo pri ili kiel ĉe la komenco.

“Tirita inter favoro aŭ malamo de l’partioj, ŝanceliĝas lia karakterabildo en historio”, diris fama poeto pri grava militestro. Tio valoras por ĉiuj biografioj, ĉu nura priskribo de faktoj, ĉu romanecigitaj biografioj riĉaj je anekdotoj. Tria kategorio, la propagandcela, estas aparta speco, facile rekonebla.

Inter la mozaiko de homoj kiujn volo kaj destino metis je la supro de homa socio troviĝas Josip Broz, la jam legenda Marŝalo Tito, vera *nom de guerre* (militnomo). Lin priskribas kamarado kaj kunbatalinto Vladimir Dedijer, en biografio aperinta en angla lingvo, videble kun la celo konigi la viron kiu kuraĝis kontraŭstari tutpotencan Stalin kaj konservi sendependecon de sia lando inter la du blokoj. Laŭ tiu ĉi vidpunkto oni devas rigardi la agadon de Tito kaj juĝi la biografion.

Sen ornamo, nude pasas antaŭ niaj okuloj la vivo de Josip Broz, kroato, kies lulilo staris en malalta domo, kie zorgoj pri taga pano estis daŭraj gastoj. Socia kaj nacia subpremo formis lian karakteron kaj donis la gvidlinion por la tuta vivo. Vladimir Dedijer uzis formon de priskribo, ne ofte rekonatan en biografioj. Inter epizodoj de la partizana milito,

plurfoje en momentoj danĝeraj, Tito rakontas al li pri sia vivo. Tion kompletigas la memoraĵoj de kunbatalintoj. En dudekkvar ĉapitroj pasas antaŭla okuloj vivo enhavoriĉa, malsupro kaj supro, ĝojo kaj seniluziigo, ĉio donita kun modesteco. Eĉ en plej senesperiga tempo, humiligita morale kaj fizike, li ne perdis la fidon je la bono de l'ideo kies realigon li fiksis al si kiel celon de sia vivo.

Okcidenta leganto plej interesiĝas pri la momentoj de la disrompo kun potenco Stalin. Tiurilate Tito pruvis sian politikan flarsenton. Li sin turnis al la popolo klarigante malkaŝe, ne kolorigante okazaĵojn. Kiu rigardas la geografian pozicion de la Jugoslavia ŝtato kaj rememorigas al si la politikan konstelacion devas diri al si: Konvinko kaj kuraĝo kuniĝis en tiu ĉi viro!

Aldono informas la leganton de la sinteno de Marŝalo Tito pri Esperanto. Ano de periferia lingvo, lerninte aŭtodidakte (kaj devige!) plurajn lingvojn, li proprakorpe komprenis la praktikan flankon de internacia lingvo "facile lernebla eĉ de homoj nemulte instruitaj". Ne estas la intelektuloj en ilia tutaĵo, kiuj kontribuos je la sukceso de la ideo, sed la popolo, la homoj ne dotitaj de mono kaj de tempo por lerni naciajn lingvojn. *Ni* ja konas la problemon kaj la argumentojn, sed devas senrezerve ĝoji, ke nin konfirmas viro kiu el propra sperto konkludis kaj havas la kuraĝon kaj sinceron ĝin konfesi atinginte la supron de la socia ŝtuparo.

Priskribi *tian* libron postulas ripetitan legadon kaj observon, tiom pri faktoj, kiom pri lingvo. La tradukinto Mason Stuttard konigas kelkajn teknikajn detalojn de lia

laboro. Eniri je ili tie ĉi rompus la kadron de la recenzo. En venonta eldono de nia revuo estos metata sub lupeo diversaj aspektoj de tiu ĉi verko, laŭ lingva kaj esperantista vidpunktoj. Mason Stuttard plenumis tiun ĉi traduklaboron en mallonga tempo; se ĝenerale la teksto legiĝas facile, certe iuj fundamentistoj ne konsentos kun la tradukinto pri la verbigo de adjektivoj (ekzemple: *la frunto altas*!). Pri tio alian fojon. Fine vorton de danko al ĉiuj kiuj laboris por aperigi biografion de "batalanto por socia justeco" kiel oni povas nomi Marŝalon Tito. La verko meritas laŭ multaj vidpunktoj esti legata de "por- kaj kontraŭ-uloj". Eĉ malamiko devos konfesi: "Jen karaktero".

Laste: komplimenton al la presejo pro bona tipografia aspekto kaj agrabla literaro. La malmultaj preseraroj estas pardonindaj, ili ne malhelpas komprenon.

*Georges Agricola.*

### Rondelo

okaze de informo rilate  
tradukon de biografio pri Tito

Tradukis *Stuttard* maratone  
dum 32 tagnoktoj *Tito*  
kun sporta spito eĉ en lito  
kaj en- kaj eksterpantalone.

Konstante, eĉ kongres-sezone  
kun LoKa ŝvito sen hezito  
tradukis *Stuttard* maratone  
dum 32 tagnoktoj *Tito*.

Pruviĝis per la verk' impone  
pri sporta brito forta sprito  
ne nur pri kvanto sed kvalito:  
Ne fanfarone—nur *Masone*

tradukis *Stuttard* maratone.

Junio 1953.

*Poul Thorsen.*



**\*La Imitado de Kristo** en kvar libroj de Thomas Hemerken à Kempis. Esperantigita de Frato Wigbertus van Zon, L.K., sub aŭspicio de Internacia Katolika Instituto, Fraterhuis Loonopzand, Nederlando. 15×10cm., 366 pĝ., bindita. Kun aprobo eklezia. Prezo : 7ŝ. 6p.

La katolika literaturo en Esperanto pliriĉiĝis per tiu ĉi traduko de unu el la ĉefverkoj de edifa literaturo katolika mezepoka. Inter la sanktuloj kaj verkistoj portintaj la nomon Tomaso, de Tomaso de Aquino ĝis Tomaso de Villanova, certe Thomas à Kempis fariĝis la plej populara, ĝuste pro tiu ĉi “Imitado de Kristo” tradukita en pli ol kvardek lingvoj. La populareco ne malgrandiĝis dum la jarcentoj (Thomas à Kempis vivis de 1380 ĝis 1471) spite la sennombrajn verkojn edifajn kiuj aperis kaj ankoraŭ aperos. Tiun ĉi disvastiĝon la libro dankas al la simpla, naiva skribmaniero, tuŝanta la senton piecan samtempe respondanta la bezonon de konsolo de homo en aflikto.

Tradukis la verkon la simpatia kaj inter ankaŭ nekatolikoj multe ŝatata kaj respektata Frato Wigbertus van Zon, tro frue forpasinta. Ĉu mi rajtas kritiki tradukon lian, li, sperta lingvisto kaj Esperantisto? Traleginte plurajn ĉapitrojn mi nur konstatas tion, ke ĝi estas agrable legebla. Bonegan laboron plenumis Frato Wigbertus, ĝi estas kvazaŭ memoraĵo je li. La modelan tradukon kompletigas vere agrabla literaro kaj praktika formato. Ke la verko trovu multnombrian amikaron oni prave povas deziri al ĝi.

H.J.

**\*Du Malsanoj en Esperanto** (Kia-ismo, Tiom-Kiom-ismo) de H. A. de Hoog. 140 p., 18×12.5 cm. broŝ. Eldonis Eric Carlén, Hällabrottet, Svedujo. Prezo : 6 ŝil., afranko 4p.

“Sed vi, kiu estas tia sama homo kiel mi”, skribis D-ro Zamenhof, tradukante la Psalmojn. Proksimume antaŭ dudek jaroj disvastiĝis kutimo skribi *kia* anstataŭ *kiel* en tiu kaj similaj frazoj. Tio grandparte rezultiĝis el la klopodoj de iuj nederlandaj instruistoj, kiuj deklaris, ke tia *kiel* estas nelogika, ke pro korelativeco *kia* nepre sekvu *tia*, ke la ‘komprenata’ kompletigo *estas* postulas adjektivon, kaj ke Zamenhof uzis nekonsekvence jen *kiel* jen *kia*. Tamen restis tiuj, kiuj kredis, ke Zamenhof verkis logike kaj konsekvence. Konkretan bazon por tiu kredo proponas la verkinto. Lia opinio Zamenhof skribis en tiuj frazoj *kiel* ne hazarde, sed pro bona motivo. Kerne liaj argumentoj estas, ke la ‘logikuloj’ ne distingas forman korelativcon de sintaksa korelativ-eco, ke *kiel* en tiuj frazoj funkcias kiel prepozicio (kp. *rilate* tion, *koncerne* min) kaj tial ne bezonas kompletigon per verbo. Li rimarkigas, ke kiam ekzistis plena sintakso korelativ-eco, tiam Zamenhof uzis *tia . . . kia* (ekz. “Ĉi estas tia, kia ŝi sendube devas esti”). El tio la aŭtoro tiras simplan regulon: neniam uzu *kia* por enkonduki frazparton.

La *kia*-istoj ‘korektis’ ankaŭ la Zamenhofan, “Li estas tiel forta, kiel vi”, al “. . . tiom forta, kiom vi”. Tion Inĝ-ro Isbrucker, Prezidanto de la Akademio, jam en la jaro 1938 nomis malsano. Ili asertis, ke ĉar grado kaj kvanto estas parencaj, la iom-serio kaj ne la iel-serio estas nepre ĝusta por esprimi gradon. La aŭtoro argumentas, ke “gradindiko

estas la fiksado de la relativa pozicio de io en ia supozata skalo aŭ ŝtuparo"; la nocio 'grado' implicas komparadon, kaj kiel preskaŭ ĉiu natura lingvo preferas uzi adverbbon de maniero por esprimi gradon, tiel faris ankaŭ Zamenhof, kiu regule uzis *tiel* . . . *kiel* en komparoj de egaleco.

Kiam ĉi tiu verko aperis felietone en *Dia Regno*, ĝia graveco ne estis tuj rekonebla, kaj oni povis supozi, ke ĵen estas ankoraŭ alia ludilo por harfendantoj. Nur ĉe ĝia apero en libra formo, oni povis ĝuste taksi ĝian valoron kiel studon pro la Zamenhofa uzado de kelkaj korelativoj. Supre mi tuŝis nur du erojn el la ampleksa enhavo, sed espereble tio sufiĉos por instigi almenaŭ ĉiun instruiston kaj verkanton de lernolibro aĉeti ĝin.

*C. D. A. Capp.*

**\*Himnaro Esperanta**, kompilita de Montagu C. Butler, L.R.A.M.  $9.5 \times 16.5$  cm., 161 paĝoj. Prezo 3ŝ.

Tiu ĉi eldono estas la kvara, se oni enkalkulas la libreton de 26 himnoj uzitan en la Ordo de Diservo ĉe la Cambridge kongreso en 1907. La nuna enhavas 236 himnojn kaj kantikojn. La kompilinto faris la elekton majstre, zorge revizianta la antaŭan eldonon. Li ne akceptis poeziaĵojn en kiuj troviĝas lingvaj eraroj aŭ stilaj krudaĵoj. La rezulto estas kolekto da himnoj kiuj ĝojigas ne nur la spiriton sed ankaŭ la orelon.

Tradukantoj de poezio angla renkontas specialan malfacilaĵon: nome, ke la poezio angla estas esence vira (t.e., la linioj emas finiĝi per silabo akcentita); kaj la poezio Esperanto esence ina (t.e., la linioj emas finiĝi per silabo neakcentita). Tiu ĉi malfacilaĵo limigis la elekton, sed ĝoje estas al angloj vidi multajn el siaj amataj himnoj en la nova

himnaro, kun la originala ritmo kaj rimo. Kore mi gratulas Sinjoron Butler.

Estas notinde, ke la himnaro estas nesekta kaj estas uzebla de ĉiuj Kristanoj, Ortodoksa, Protestanta aŭ Katolika.

*A.E.B.*

**Nia Kantaro.** Eldonejo Esperanto A/S, Oslo, Norvegujo, 1954. Formato  $10 \times 16$  cm. Prezo ne indikita.

La kantaron kompilis samideanoj Erling Anker Haugen, Erling B. Naess kaj Ragnvald Rian. Ĝi konsistas el 87 kantoj ordigitaj en jenajn grupojn: la movado, naciaj himnoj, seriozaj kantoj, hejmo kaj familio, popolo kaj naturo, klubo kaj amika rondo, kanzonoj, ludkantoj kaj diversaj kantoj. Tre trafe diras la lasta kanto de la libro, la t.n. postkanto, ke "Al ĉiu plaĉi neniu povas" kaj "eĉ kiel ajn vi aranĝi penas, vi ĉiam guston de iu ĝenas". Se oni volas apliki tiujn vortojn pri la libro, ĝi nepre pravas. Tamen, laŭ mia opinio la kompilintoj faris tre bonan elekton. Nur bedaŭrinde, ke ili forgesis citi la nomon Hougaard sub la numero 60 "Bonvenon al la anoj".

*Inge Mortensen.*

**\*Adamo kaj Eva.** Dramo en Tri Aktoj, de Francisko Azorin. Eldonita de la aŭtoro, ĉe Guadalquivir 41. E., México D.F., Meksikio.  $17 \times 12$  cm. Prezo 8p., afrankite.

Ĉi tiu 15-paĝa libreto pritraktas la pekon de Kaino, laŭ vidpunkto de Eva. La verko estis skribita por la Belarta Konkurso de la Kongreso en Haarlem, sed ne sukcesis, kredeble ĉar, kvankam nomita dramo, ĝi estas nur ilo per kiu la aŭtoro sternas siajn ideojn. Agado estas malmulta, kaj la iom naivaj paroloj ne havas vere dramecan kvaliton.

*Dino.*





## Nia Forumo

### PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn

#### Ĉu Esperanto havas genitivon?

Nia eminenta samideano J. Régulo-Pérez, kies artikolojn mi ĉiam legas kun granda intereso, asertas en sia studaĵo *Kazoj en Esperanto* ("Esperanto", Aprilo 1954)—inter aliaj trafaj rimarkoj—ke Esperanto havas ankaŭ genitivon, citante la Tabelvortojn *kies*, *nenies*, k.t.p. Laŭ samideano Régulo-Pérez tiu formo povus plu-evolui en nia lingvo ĝis formiĝo de ĝenerala genitivo, ekz. *patres* aŭ *patries*, kaj tio ne estus malfundamenta.

Laŭ mia opinio oni ne povas paroli pri genetivo, kiam temas pri Tabelvortoj. Laŭ la Fundamento, ĉiu Tabelvorto estas vorto aparta, ne derivaĵo. Se ne estus tiel, ni ne nur havus genitivon, sed ankaŭ "lokativon" (*tie*, *kie*, k.t.p.), "kaŭzativon" (*tial*, *kial*, k.t.p.), "temporativon" (*kiam*, k.t.p.), "numerativon" (*kiom*, k.t.p.), "modifikativon" (*kiel*, k.t.p.); aŭ oni povus doni aliajn belajn nomojn al tiuj "ivoj".

Samideano Régulo-Pérez donas difinon de la gramatikaj kazoj. Mi iom pli simpligus la difinon jene: "Gramatikaj kazoj en Esperanto estas la diversaj formoj de substantivaj kaj adjektivaj konceptoj, kiuj helpas esprimi la rilatojn inter tiuj vortoj kaj aliaj parolelementoj. Ekzistas singularaj kaj pluralaj kazoj." Mi diris: substantivaj kaj adjektivaj "konceptoj", ĉar kvankam *tiu*, *tia* kaj similaj pronomoj (ankaŭ

la pronomoj *mi*, *vi*, *li*, k.t.p.) nek estas substantivoj nek adjektivoj, ili entenas substantivan aŭ adjektivan koncepton, ili anstataŭas substantivojn aŭ adjektivojn. Tamen *kies* ne estas derivaĵo de *kiu* aŭ de *kia*, ĉar se estus tiel, ni devus havi la formon *kius* aŭ *kiues*, kaj *kias* aŭ *kiaes*, ne simple *kies*. Tiu lasta estas *pronomo posesiva* sendependa, neniel derivaĵo.

Se en kelkaj cirkonstancoj ni egalrajte povas diri *de kiu* kaj *kies*, en aliaj tio absolute ne eblas. Ekz.: "*De kiu* vi ricevis la novaĵon?" oni ne povas anstataŭi per "*Kies* vi ricevis la novaĵon?". Ankaŭ: "*La vero de tiu* aserto ne estas pruvebla" neniel povas esti anstataŭata per "*La vero ties* aserto k.t.p.". La vortoj *kelkies*, *multies*, same kiel *kelkiu*, *multiu* estas kunmetitaj vortoj. El tio sekvas ke *kelkes*, *multes* estus absolute eraraj formoj ne akcepteblaj.

Parolante pri evoluo de Esperanto, samideano Régulo Pérez mencias la eblon de estontaj formoj *patr(i)es* k.s. Al mi kontraŭe pli verŝajnas la arkaismiĝo (ebla, neniel certa) de la formoj *kies*, *ties*, ĉar la tendenco al plisimpliĝo de gramatikaj formoj kaj ne la kontraŭa procezo pli ĝeneralas en ĉiuj esprimiloj. La formo *patriu* ja logike ankaŭ kondukas al la formoj: *patrie* (ĉe la patro), *patrial* (pro la patro), *patriel* (kiel la patro, simile al patro), kaj al similaj monstraĵoj.

*Ernesto Sonnenfeld, Argentino.*

# Belartaj Konkursoj 1954: Poezio Originala

**Antaŭ Spegulo** ricevis la 1an premion ; **Premsonĝo** la 2an

## Antaŭ Spegulo

Klare hela sun' el la lito logas.  
Aĥ, spegul', ĉu vi ne mensogas ?  
Diru vi, sklavin', ĉu spegulo pravas ?  
Vere mi ravas !

Iom palas mi..La ruĝilo?—Dankon..  
Miru, stultulin', mi toleros mankon.  
Daŭre trudas sin tragedia sceno  
en la areno.

Ne tro da parfum'. Ĝi por ĝojo taŭgis.  
Longe luktis li . . . Oni tre aplaŭdis . . .  
Poste—eh, renvers'. Li fatalon spite  
skermis vundite . . .

Kiel kombi min ? Estas ja egale . . .  
Ĉar funebras mi, do spiralu fale  
mia nigra har' . . . Tia vir' kuraĝa,  
bela, junaĝa !

Lasu sen ornam'. Afliktita koro.  
Mortis, mortis li, la gladiatoro.  
Sed mi vidas min kvazaŭ tra nebulo  
en la spegulo . . .

*Eli Urbanová.*



## Premsonĝo

Ekde true en mallumo  
venis brue granda zumo,  
prenis brute en la fumo  
vivojn de la ter'.  
Se matenoj bonodoris  
en ĝardenoj kiuj floris,  
ĉiaj benoj forvaporis,  
restis la sufer'.

Ili ŝutis ŝtalan ŝtormon  
sur la homan paĉan dormon,  
ŝanĝis ĉion en senformon ;  
sangis tuta land'.  
Kaj la domoj estis pestaj,  
kaj la homoj iĝis bestaj,  
nur malbonoj estis restaj ;  
ĉesis ĉiu kant'.

En infera karnavalo  
sub la fera arma falo  
iĝis tero karda valo,  
ĉu reeblos vek' ?  
Kaj la kortoj fumis putre,  
kaj la korvoj nubis supre  
kie korpoj kuŝis nutre  
logaj al la bek'.

Sub mortiga bomba kraĉo  
vivoj iĝis torda kaĉo  
preta por la morda maĉo  
de malsata hund'.  
El la vento kiu muĝis,  
el la venko kiu ruĝis,  
el la venĝo, kien fuĝis  
vi kun via vund' ?

Premas min ĉi ĉio naŭze,  
tremas daŭre mi senkaŭze,  
ĝemas mia kor' senpaŭze  
dum sencela ir'.  
Ĉu neniun kun mi solu ?  
ĉu nenio min konsolu ?  
ĉu neniun sorto volu  
ĉeson de la ŝir' ? . . .

*Claude Piron.*





# Belartaj Konkursoj 1954 : Poezio Traduka

Hans Hartvig Sedorff

Unua premio

## Leprulo

Mi grincas kaj mi grakas.  
Mi krias kaj mi krakas,  
per la klakiloj klakas  
por timo kaj obsed'.  
Pri venĝo mi ne revas :  
*Manĝrestojn* mi ricevas—  
kaj vidu : Mi diskrevas  
de frunto ĝis pied' !

Ĉar Dio elingigis  
la glavon kaj min pikis—  
kolere Li irigis  
min naŭze al sanul'.  
Kaj flamoj de doloro  
nur logas kun favoro  
la muŝojn por esploro  
en fendoj kaj pustul'.

La seka lango brulas,  
sendenta buŝululas,  
la manojn glutis *Ulas*\*  
hundaĉoj en ĉi-jar'.  
Mi krevas jam kun sperto,  
sed floras en dezerto  
de vangoj ĝis la verto  
ulceroj sen kompar'.

La sango vundojn ringas,  
dum muŝoj fest-mitingas,  
kaj rostro-buŝoj drinkas  
la molan karnon mem.  
Mi la klakilojn levas,  
averti mi ja devas,  
eĉ se la haŭto krevas  
pro ĉio puŝ' kaj prem'.

Mi rampas laŭ panelo  
de "Astor-house"—hotelo  
ĝis ŝtupoj de l'bordelo—  
mi kombas ĉe la frunt' ;  
Varmeta in-odoro  
penetras ĝis la koro,  
sed velkas la amoro  
por iĝi freŝa vund'.

Vi, kiun mi karesis,  
jen, kion vi forgesis ;  
Favulo, kiu ĉesis  
ekzisti en hom-gent'.  
Gutetas plora fluo  
de la okula gluo,  
la nazo estas truo,  
la buŝo faŭka fend'.


Sed sub la haŭto marna  
fi-tento nestas karna  
kaj roŝtas koron varma  
en viva pra-mumi'.  
La dolĉa manko kulmas,  
volupto ruĝe fulmas,  
kaj eluzite pulmas  
sopiroj kiel kri'.

Sed ĉeno de la vivo  
konsistas el soifo,  
malsato kaj lascivo  
ĝis lasta ĉeno-er'.  
Eĉ scias hundo mia,  
ke vivas mi pli fia,  
tial, ho, moŝto via,  
jen mia mon-teler' !

El la dana tradukis

*Poul Thorsen.*

\* *Ulas* : propra nomo.



# Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horszistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

*Mallongigoj* : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

|                 |             |                                                                                                                          |
|-----------------|-------------|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| <b>Lundo</b>    | 12.30–13.00 | La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.                                                     |
|                 | 22.10–22.20 | Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV., Aŭstrujo.                                    |
| <b>Mardo</b>    | 11.55–12.00 | Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.                       |
|                 | 14.30–14.45 | Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato). |
|                 | 17.35–17.40 | Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 25.61m. P. D-ro Baur.                                                                   |
|                 | 22.30–23.00 | Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.                                                          |
| <b>Merkredo</b> | 15.30–15.40 | Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m.                                                                                      |
|                 | 16.00–16.10 | Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.                                                              |
|                 | 17.50–18.10 | Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.                                  |
|                 | 19.30–19.45 | Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.                               |
|                 | 22.15–22.20 | Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando                                                |
|                 | 22.15–22.30 | Hilversum. 402m. P. (nur 27-X, 24-XI). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.                                   |
| <b>Ĵaŭdo</b>    | 07.30–07.35 | Lille. 218m. I.K. Radiodiffusion Française, Emission Esperanto, 36 Bd. de la Liberté, Lille (Nord), Francujo.            |
|                 | 08.30–08.45 | Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.                                                            |
|                 | 11.55–12.00 | Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.                                                                                        |
|                 | 17.35–17.40 | Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.                                                                                        |
|                 | 22.50–23.10 | Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.                                                                            |
| <b>Vendredo</b> | 17.50–18.10 | Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.                                                                                    |
|                 | 21.30–21.45 | Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.               |
| <b>Sabato</b>   | 08.30–09.00 | Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.                          |
|                 | 22.15–22.20 | Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.                                                        |

**Radio Roma.** 3-XI, Novaĵoj el Italujo ; 5-XI, Itala belarta urbo Cosenza ; 10-XI, Itala folkloro ; 12-XI, Leterkesto kaj bibliografio ; 17-XI, Haltoj en Bologna, urbo de la 40a U.K. de Esperanto ; 19-XI, Kia estas via aĝo ? (radiofantazio) ; 24-XI, la arbo-festo en Italujo ; 26-XI, Novaj napolaj kanzonoj (kun muziko).

Ni atentigas al la legantaro, ke leteroj skribitaj al radiostacioj ne nur kuraĝigas la dissendantojn, sed ankaŭ rekte kontribuas al perfektigo de la programoj mem. Oni skribu nur al la adresoj supre montritaj, donante raportojn pri aŭdebleco kaj aldonante, se konvene, objektivajn kritikojn.



W. H. Coventry :


# Pactempa Utiligo de Militmaterialo

## La “Bailey” Ponto

**J**E la komenco de la mondmilito en 1939 la ekipaĵo de la brita armeo—kiel cetere de multaj aliaj pacemaj nacioj—estis iomete ekstermoda. Post la retiro de Dunkerko konstatigis la bezono por diversaj plinovtipaj armiloj, interalie nova ponto, kiu estu facile portebla, rapide konstruebla kaj adaptebla al ĉia ajn tereno, kaj samtempe sufiĉe fortika por porti la modernajn armeajn transportveturilojn kaj tankojn. La problemo estis metita al la Eksperimenta Pontinstanco ĉe Christchurch, Anglujo, kiu komencis pristudi ĝin en februaro 1941. Kuna laboro de ĉiuj anoj de la Instanco rezultis en projekto, laŭ kiu ponto estis konstruita eksperimente en julio 1941. Ĝi pruvigis taŭga, kaj

komplimente al la estro de la Instanco, Sinjoro (nun “Sir”) Donald Bailey, la nova tipo de ponto ricevis la baptonomon *La Bailey Ponto*. Diversaj firmaoj ricevis kontraktojn de la Proviz-ministerio, unue laborantaj sub la reĝo de 8 “patro-firmaoj”, kaj ĝis la fino de la milito ne malpli ol 650 firmaoj estis okupitaj en la fabrikado de la diversaj eroj de la Bailey Ponto.

La rolo, kiun ludis la Bailey Ponto en la milito, estis grava, precipe en la rapida antaŭeniro tra Italujo post la invado de Sicilio kaj tra Belgujo, Nederlando kaj Germanujo post la invado de Normandio—tiu “balaila” antaŭenpuŝo, kiu fine gajnis la venkon. Ĝi uziĝis en la Alpoj por anstataŭigi detruitajn pontojn trans



*Bailey Ponto super Rivero Clutha, Nov-Zelando*



la montopasejoj kaj trans riveroj kaj inundoj en Italujo, Francujo, Belgujo, Nederlando kaj Germanujo—multaj legantoj sendube rememoros la “Montgomery” kaj “Patton” Pontojn trans la Rejno.

La grandaj avantaĝoj de la lerte elpensita konstrumetodo de la nova materialo estas: ke la eroj estas kompaktaĵoj kaj malpezaj, tiel ke oni povas kunmeti ilin en kian ajn ponton sen maŝinoj—unu plotono povas porti kaj mane konstrui ponton; la adaptableco de la kunmetado por konstrui laŭ la tereno; ke pro la norma desegno kaj fabriko de la eroj, ĉi tiuj estas facile interŝanĝeblaj; ke oni povas konstrui laŭbezzone taŭgan ponton por kia ajn trafiko, eĉ la plej peza milita; kaj la rapideco de la konstruo. Fine, kaj ne malplej grave, ke oni povas malkonstrui la ponton kaj reuzi la materialon tiom ofte, kiom oni volas.

La disponebla spaco ne permesas detalan teknican priskribon de la materialo, sed oni povas diri mallonge, ke ĝi similas grandskalan “Meccano”. La ĉefaj eroj estas: la *paneloj*, kiujn oni kunligas finalfine per panelpingloj por formi longan *flanktrabon*; la *transtraboj*, per kiuj oni kunligas la flanktrabojn kaj formas *plankbazon*; la *kadraj plankelementoj*, kiuj restas sur la transtraboj kaj transe de kiuj oni metas la lignajn plankojn, kiuj formas la ŝoseon. *Stabiligiloj* transe sub la sekcioj kaj ĉe la flankoj inter la paneloj kaj la transtraboj evitas troan tordiĝemon. La panelajn flanktrabojn oni povas konstrui unu-, du- aŭ tri-oble kaj unu-, du aŭ tri-range. Pontoj povas esti konstruitaj, kiuj restas sur la du finoj, kiuj pendas per dratŝnuregoj de du finaj turoj, kiuj flosas flekseble sur pontonoj kaj kiuj restas sur kolonoj, kiuj povas

esti mem kunmetitaj el Bailey materialo, kaj oni povas ankaŭ konstrui kajojn, fiksaĵojn kaj flosajn, kaj ĵeteojn.

Post la fino de la milito la Brita Registaro disponigis grandajn kvantojn de troa provizo, kaj la pacaj uzoj de la Bailey-materialo tiel multobligis, ke estas vere nun diri, ke ĝi estas uzata en ĉiuj partoj de la mondo por la plej diversaj celoj. Civilinĝenieroj ĉiulandaj montris veran genion en la utiligo de la materialo, kaj krom pontojn plej diversajn (precipe portempajn dum riparo kaj rekonstruo de malnovaj aŭ milite difektitaj vojoj, kaj dum la konstruo de novaj vojoj en nove evoluigita teritorio) ili konstruis kajojn, deponejojn, fabrikejojn, rulbandportilojn, kablotransportilojn, aŭtomobilejojn, kaj kadrojn por la konstruo de digoj kaj marmuroj, fervojajn varstaciojn k.t.p. Bailey-materialo helpis al la riparo de la digoj en la nederlandaj inundoj, kaj la Bailey Ponto trans la Tamizo kaj la kajoj ĉe la South Bank kaj Plezurgardeno ĉe Battersea en la Festivalo de Britujo estis familiaraj vidaĵoj de tiu granda ekspozicio. Kvankam oni ne povas diri ke el glavoj forĝiĝis plugiloj, oni povas ja diri ke jen armilo uzita—eĉ senŝanĝe—por helpi al paca progreso.

La verkinto volonte ekscios pri aliaj uzoj de Bailey-materialo, pri solvendaj problemoj en kiuj ĝi povus utiliĝi, kaj ankaŭ pri iuj kvantoj de materialo ne plu uzataj kaj disponeblaj. Oni skribu al W H C, ĉe U. E. A., Rickmansworth.

*Bailey Pontoj laŭ valoro preskaŭ £1,000,000 estas eksportitaj el Britujo en la lasta jaro, plejparte pro la agado de Engineering kaj Industrial Exports Ltd., 113 Park Street, London, W.1, kiu afable havigis al ni la fotojn uzitajn.*



Ernest Paul :

## La Termitoj—blankaj formikoj

<sup>IIA</sup>**C**I tiuj tropikaj insektoj havas malmulton komunan kun aliaj formikoj, kun la escepto de la socia instinkto—fakte ili estas instinktaj malamikoj. La termitoj formas grupon inter la sociaj abeloj aŭ vespoj kaj la veraj formikoj. La termitejo povas esti grandega afero, tursimila, platigita en la direkto oriento kaj okcidento, la tielnomata *kompastermitejo*.

Dum la konstruo de la perfosta Aŭstralia telegrafo, unu el ĉi tiuj turoj, kiu troviĝis ĝuste en la celita vojo de la telegrafo, havis altecon de dudek metroj; la laboristoj do senpintigis ĝin. Tio okazis en la jaro 1870, tamen en la jaro 1933 oni trovis, ke ĝi estas riparita ĝis la antaŭa alteco.


Ili estas konstruitaj el tero, miksitaj kun la salivo kaj ekskremento de la termitoj kaj bakita de la varmo de la

tropika suno; ili iĝas tiel rezistaj, ke oni ne povas difekti ilin eĉ per frapado de pioĉo.


\* Ĉe Kongwa en Afriko, kie la antaŭa brita socialista registaro provis kreskigi arahidojn por margarino la terkulturistoj devis disigi la termit-ejojn per dinamito; ankaŭ sur la Afrikaj aeroplanoj ili estas ĝenaĵo.

La insektoj sin nutras preskaŭ sole per ligno, kaj povas formanĝi la lignon de kestoj lasitaj surtere dum la nokto; tamen oni ne rimarkos la fakton ĝis oni ekmovos la kestojn; tiam ili tute disfalas en polvon, ĉar la termitoj, laborinte interne de la ligno, lasis la surfacon kiel maldikan surlamenon—ŝajne netuŝitan. Ankaŭ aliaj mirindaj rezultoj estis atingitaj per la laboro de la insektoj.

Ekzemple, enkadrigita bildo sur la muro de forlasita bangalo aspektas kiel kutime je la reveno de la








posedanto. Eble pasas du-tri tagoj ĝis li provos movi aŭ purigi ĝin ; tiam eble li trovos la vitron algluita al la muro per sekiĝinta salivo kaj la kadro tute disfalos en polvon.

La termitoj dependas de certa parazito por digesti la lignon—ili

vojaĝadas surtere ĝis pli ol cent metroj, tute ĉirkaŭ la nesto, por elserĉi kaj ataki lignaĵojn ; tamen ili ĉiam laboras ŝirmitaj per kovraĵo de polvo kaj salivo, tiom ili timas la aliajn formikojn, kiuj nepre atakos ilin unuavide.

Interne de la temitejo troviĝas kvar diversaj specoj de termitoj—unue la reĝino, la plej grava ĉar ŝi demetadas la ovojn por daŭrigi la loĝantaron—fakte ŝi estas nur pufiĝinta groteska ovproduktmaŝino. Ŝi havas longecon de dek ĝis dek tri centimetroj, kaj ŝi demetas ovon ĉiusekunde, tridek mil ĉiutage. Ĉar ŝi vivas kelkajn jarojn entute, ŝi demetas centojn da milionoj ! Ŝia grandeco estas centoble tiu de la laboristoj. Nun la reĝo—li havas grandecon de malpli ol dekono de tiu de la reĝino. Lia sola devo estas fekundigi la ovojn kaj, kiel vi povas imagi, tio estas tuttempa ofico !

La reĝa ĉambro estas bone ekipita rilate komfortaĵojn, kun ĉiam atendantaj laboristoj, tamen





bedaŭrinde devas resti tie dumvive, kvazaŭ en malliberejo, la reĝa paro, ĉar la elirvojo estas tiel mallarĝa, ke ĝi tute ne permesas al ili eliri.


Nu kompreneble, ĉio ĉi postulas senĉesan nutraĵon. Multfoje dum la tago la laboristoj nutradas ilin, sed la dieto povus ŝajni, almenaŭ nia-opinie, iomete monotona, ĉar la vivrimedo konsistas nur el speco de florbrasikoj, malgrandaj kiel pinglokapoj. Ĉi tiuj estas la fruktoj de fungo, kiun ili kreskigadas en speco de fungoĝardeno farita el maĉita ligno.

La fungo estas aparta speco nomata *Xylaria*, kiu tute rifuzas kreski ekster

estas sufiĉe doloriga. Kaj oni ne povas eltiri ilin ne disiginte la korpon de la termito.

Kvankam blindaj, ili elserĉas truojn en la termitejo kaj fajfas, jes, vere fajfas, por alvoki la laboristojn kiuj, pomilione, alportanta la riparmiksaĵon respondas al la signalo. La laboristoj nutras la soldatojn nur per salivo—digestita ligno; ili ne ricevas la reĝajn florbrasikojn.

La laboristoj, vere sekse-neperfektaj inoj, devas furaĝi, serĉante lignon, kiun ili maĉadas, parte digestas kaj poste demetas sur la fungoĝardenon, kie ĝi interpenetriĝas de la fadenoj de la fungo, simile al agarikbedo, kaj



la termitejo; tiom longe ĝi al kutimiĝis kreskadi interne, ke ĝi perdis la kapablon prosperi aliloke.

La reĝa paro, estas vere, variigas la monotonon manĝante de tempo al tempo unuopan ovon.

La laboristoj samtempe elportadas la ovojn por prizorgi ilin en speco de infanejo. Fine la militistoj—ili havas nur duonan grandecon de la reĝo. Ili estas blindaj, posedas makzelojn malsimilajn al tiuj de la laboristoj ĉar ili neniam atakas lignon. Fakte, ili ne povas nutri sin. Ĝuste tiel same kiel homaj militistoj, ili atakas nur malamikojn. Ĉirkaŭ la kapo troviĝas armilaĵoj, kaj la mordado kiam la makzeloj renkontiĝas en via karno

siatempe la florbrasiksimilaj korpoj aperadas.

La laboristoj, vizitante la reĝan ĉambron, ĉiam eklekas la korpojn de la reĝa paro. Se io kaŭzus la morton de unu aŭ la alia el la paro, anstataŭanto aperos el la ordinara laboristoj, sed nur en tiu okazo. Kiam la tempo iĝas konvena por starigi novan kolonion, multaj el la ovoj iĝas flugilhavaj kaj sekse maturaj termitoj, kaj forflugas el la termitejo, adiaŭate de la militistoj kiuj ĉirkaŭstaras la elirejon.

Post mallonga flugado, eble la sola afero kiun ili iam ajn ĝuos, ili falas teren, formordas la flugilojn kaj rapide elserĉas ŝirmejon, antaŭ ol ili

Mason Stuttard :

## Bolonjo—Unuaj Impresoj

**A**L sunsopira spirito—kaj tiuj oftis en la ĉi-jara nordeŭropa somero—alveno en Bolonjo estis kiel varma kareso de patrino. La brunruĝaj tonoj de la grandaĝaj muroj sorbas la brilon de la tago kaj ĝin transformas en delikatajn nuancojn de ĉefverko pentra. Dum la tuta longa tago la oktobra suno verŝas siajn radiojn en la urbon kreante spirhaltigajn efikojn de lumo-ombro, precipe en la malnovaj stratoj kie dikaj muroj masivas pezante sur kolonoj fortaj.

Bolonjo estas antaŭ ĉio urbo de palacoj. Ĉiupaŝe riveligas novaj beloj de konstrua arto kaj la mozaiko de la jaroj trovas sian esprimon en la interimplikiĝo de stiloj plej diversaj. Ekvilibro en malegalo, harmonio en kontrasto.

Situante ĉe la deklivaj ekstremo de Apeninoj sur granda ebenaĵo, Bolonjo kun sia duonmiliono loĝantaro estas natura trafika centro inter norda kaj suda Italujo. Konsulto ĉe la mapo montras kiel la trafikaj arterioj konverĝas al ĉi tiu punkto. Sekvo de tio estas, ke ĉi tiu antikva urbo etruska akiris en tempo moderna karakteron kosmopolitan, kiu tamen ne detruis la intimon kaj gajan kamaradecon de ĝia popolo.

Post la unua impresoj de antikva tradicio kaj grandaĝa kulturo la plej forta impresoj estas de la etoso de gajo kaj optimo en la vivo surstrata. Komprenu bone: kvankam la suno ne damaĝas sian vivodonan varmon la malnovaj arkitektoj de Bolonjo faris tre prudentan antaŭzorgon por ke la urbanoj ne havu ĝenon de tio. En ĉiuj stratoj la trotuaroj sin kaŝas en agrabla ombro de grandegaj

portikoj kie piedirantoj sekure iras sian vojon, butikumas, aŭ simple—kaj saĝe—sin lokas ĉe unu el la multaj tabletoj kaj en malurĝo rigardas al la “mondo kaj lia edzino”, samtempe prave sin senigante de soifo . . . Kaj sub ĉi tiuj masivaj arkadoj vidiĝas la apoteozo de eleganto. La fenestroj de modaj butikoj stimulas en la preterpasanto nerezisteblan frenezeton de elspezemo! Tiel rafinitaj estas la varoj elmontrataj.

Kaj la manĝaĵoj . . . ! Kia sveniga sortimento de salivigaj varoj! De ĉiu koloro kaj formo, de ĉia konsisto kaj speco; por ĉia palato! Por orelo neitala la nuraj nomoj estas muziko dolĉa—tortellini, tagliatelli, ravioli . . . Laŭdire en Italujo troviĝas 164 specoj de vinbero! Kia ambrozia elekto atendas la frandemulon!

Kiu frostotremas en ventovipita nordo, kiu sin ŝirmas per mantelo pluva kaj ombrelo, kiu sopiras al suno kaj varmo . . . venu, nepre venu al Bolonjo!

---

**La termitoj :** *fino.*

estos formangitaj de la veraj formikoj alispecaj.

Ne pli ol unu en ĉiu miliono sukcesas postvivi la edziĝan flugon—la tero estas kovrita per la mortintoj.

Tio kio regadas aferojn ĉe la termitejoj tiel ke ili restu bonordemaj ĝis nun ne estas klarigita kontentige, tamen la francaj naturistoj kiuj pleje studadis la grupon proponis kelkajn ŝajne kredindajn teoriojn pri kiuj ni ne povas diskuti pro manko de spaco.



# E<sup>h</sup>oj de la Haarlema Kongreso

Amuza informo pri la 39a Kongreso aperis en la *New York Times*, la unuan de aŭgusto, teksto sendita al ni de regula leganto de nia revuo.

Utilas represi tradukon de tiu ĉi informo por montri ĝis kia grado la distanco sukcesas ŝanĝi la aspekton de okazaĵoj. (La vortoj kursive skribitaj troviĝis inter la angla teksto en Esperanto) :

## **Universala Kongreso de Esperanto ĉagrenita kiam diplomato uzas germanan lingvon**

Speciala raporto al la  
New York Times

Haarlem la 1an de aŭgusto 1954, 2,000 entuziasmoj por tutmonda lingvo kunvenis ĉi tie en la 39a Universala Kongreso de Esperanto.

La ĉefministro nederlanda Willem Drees, prezentita kiel *Ministro-prezidanto* kaj parolante en Esperanto, diris ke li esperas ke la lingvo estos uzata pli kaj pli dum la venontaj jaroj.

*Sinjor Doktoro* Drees, diris al la reprezentantoj el proksimume 30 nacioj ke ilia *kongreso* estas io speciala ĉar ĝi bezonas neniun interpretiston. Ni povas ĉiuj nin senti egalaj, diris la *Ministro-prezidanto*, ĉar la lingvo kiun ni parolas ne estas fremda al iu ajn el ni.

Li parolis tro frue. Aŭstra diplomato leviĝis kaj komencis alparoli la surprizitan kongreson en la germana lingvo. Kelkaj kongresanoj siblis kaj iu virino kriis "*Honto*". Kiam sekvintaj oficialaj gastoj legis la alparolojn esperante, la atmosfero fariĝis pli kora. Estis vastampleksa konvinko inter la delegitoj, ke kun

sufiĉe da tempo kaj bonvolo la resto de la mondo komprenus la avantaĝon de la sepdekjaraĝa artefarita lingvo.

Ĝi estis ellaborita de Oulis L. Zamenhof, rusa lingvisto kiu uzis pseŭdonimon D-ro Esperanto kaj laboris sur la bazo de ekzistantaj eŭropaj lingvoj.

La Urbestro de Haarlem, ankaŭ parolante en Esperanto, diris ke estas bona afero ke ĉiuj ĉeestantoj povas kompreni unu la alian, sed ke estas pli bone ke la movado povas esti ilo en la klopodo por tutmonda paco. La avantaĝo de ĝenerale komprenata lingvo evidentiĝis kiam viro el la ĉeestantaro svenis. La krio "*Doktoro*" estis komprenata de ĉiuj. Granda parto de Haarlem estis esperantigita por la semajndaŭra kongreso kaj la taksiŝoforo kiu alvenis por konduki la malsanan gaston al Amsterdam estis mem la fiera posedanto de Esperanta diplomo.


---

## ĈU

vi jam pagis vian kotizon por 1955 ? Se ne, memoru ke frua pago estas granda helpo al ni—kaj al vi, ĉar tiamaniere vi evitos interrompon en la livero de la revuo.

Kotiz-tabelo troviĝas en la dua parto de la jarlibro (jam forsendita) sur paĝo 6. Atentu, ke la kotizo por Patrono duoniĝis : kiel rezulto ni esperas bonvenigi kelkajn novajn patronojn.

## Enigma Konkurso N-ro 92



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 89 Av. du Sacré Coeur, Brussel-Jette, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respond-kupono internacia.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 88-a konkurso: S-ro T. K. Slade (Brit) 128, S-ro E. Pajunen (Finl) 117, S-ro B. S. Trier (Dan) 114 p.

**Enigmo N-ro 209:** 1. granda mevo—korpoparto; 2. elpensi ion novan—detala etato; 3. superulo—podio; 4. necesa en manĝaĵoj—ĉambro; 5. malagrabra sento—parto de veturilo; 6. tranĉa—saltinsekto; 7. manĝaĵo—estri; 8. divano—duonfilozofo; 9. ĥemia elemento—ruĝhaŭtulo; 10. sovaĝa porko—monato; 11. iri—birdeto; 12. legomo—plenumanta agon, uzante mallongan tempon; 13. kolektiva—muzika teatraĵo; 14. promenejo—memore; 15. vegetaĵo kun fortaodoro—lerto akirita per ripetado; 16. rizobrando—oleoriĉa planto; 17. aroma vegetaĵo—kapoparto; 18. inklino al persono—maldolĉa; 19. nombro—izoligo; 20. ludilo—vira kapvesto; 21. estri—leĝo; 22. moviĝi—vegetaĵo; 23. negativa—malofta gaso; 24. regula aranĝo—esprimi sian volon.

Ĉiuj supraj klarigoj difinas radikojn de vortoj. La duan radikon sub iu numero oni trovas, aldonante unu el la ĉi-subaj ŝajnaj sufiksoj al la unua radiko sub tiu sama numero. La komencliteroj de la trovitaj vortoj formas, en la donita sinsekvo, esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof. ad - an - ar - er - id - il - in - ing - ist - on - ul.

**Enigmo N-ro 210:** Krucvort-enigmo. Figuro: kvadrato ( $15 \times 15$ ) sen nigraj fakoj. Horizontale: 1. birdeto (R)—ventroforma ujo (R)—

religio (R); 2. garantio de kambio—insekto kiu kaŭzas skabion—glavo; 3. arbo (R)—entuziasmigita (R)—brilglazurigita (R); 4. plej elektitaro—arbeto kreskanta en sablaj grundoj—aldoni (R); 5. arkitektura stilo (R)—akva planto (R)—kialo (R); 6. juvelŝtono (R)—batalkampoj—logike kunmeti argumentojn (R); 7. Monavida — bonodora floreto (R) — melankolia lirika poemeto (R); 8. blovmuzikilo (R)—rabofiŝo—plej alta grado (R); 9. moka dirmaniero (R)—malmultekosta (R)—akuta angulo formata de du renkontiĝantaj samaj kurbaj linioj; 10. konfirmi traktaton (R)—kio impresas la flarsenton—gaso kiu emanis el radiumo (R); 11. desegni linion (R)—granda glando (R)—ame tuŝeti (R); 12. interpunkcia signo (R) — havi rezultaton — proksima; 13. doni al iu ion bonan (R)—negliĝa vestaĵo (R)—lerto akirita per ripetado (R); 14. eliĝi nevideble—arbo (R)—inspiri piajn sentojn; 15. piedhava pokalo (R)—kaŭzi teruron (R)—taŭgaporsubtenila bonfarton (R).

Vertikale: 1. H-1a, H-6a, H-11a; 2. H-2-a, H-7a, H-12a; 3. H-3a, H-8a, H-13a; 4. H-4a, H-9a, H-14a; 5. H-5a, H-10a, H-15a. 6. H-1b, H-6b, H-11b; 7. H-2b, H-7b, H-12b; 8. H-3b, H-8b, H-13b; 9. H-4b, H-9b, H-14b; 10. H-5b, H-10b, H-15b; 11. H-1c, H-6c, H-11c; 12. H-2c, H-7c, H-12c; 13. H-3c, H-8c, H-13c; 14. H-4c, H-9c, H-14c; 15. H-5c, H-10c, H-15c.

Ekzemple V4=plej elektitaro—moka dirmaniero (R)—eliĝi nevideble.



# La plej eksterordinara ulo kiun mi renkontis : La Kuracisto de Lennox

de A. J. Cronin

**C**U vi deziras scii kiu persono faris al mi la plej profundan impreson ?

Pripensinte mi konstatas, ne sen miro, ke estas nek fama ŝtatviro, nek soldato, nek grandulo de ĉi tiu mondo. Ne, estas simplanima bonkorulo kiu, neniel revante pri superregado, serĉis nur venki la sorton kaj sin mem.

Mi konatiĝis kun li en Lewenford, lia naskiĝurbo en Skotlando. Tiam li estis malfortika knabo, sensignifa kaj malriĉa, kiun nia bando da aventuremaj buboj apenaŭ toleris. Li altiris atenton nur per siaj malperfektoj. Li lamis en komika maniero. Unu el liaj kruroj estis tiel mallonga ke oni estis devinta meti dekkvincentimetran plandon al la ŝuo. Kaj vidi lin kuradi, posttrenante sian malbonan kruron, dum ke lia malforta korpo estis streĉita pro penado, la vizaĝo fajra kaj ŝvitbanita . . . : jen kio iom klarigas kial la pastro-filo Chisholm, la brilspritulo de nia bando, esprimis nian penson moknomante lin "Punkto kaj Streketo".

"Atenton", ni kutimis krei, "jen Streketo ! Ni malaperu, sen kio li sin alkroĉos al ni !" Kaj ni forrapidis por bani aŭ por trakuri la arbarojn dum "Streketo" lamadis post ni, bonhumore kaj senproteste.

Nur lin oni povis imagi tia, kun lia samtempe timema kaj gaja sereneco. Kaj kiom do ni primokis lin ! Streketo ja estis por ni ekster-normalulo. Liaj vestoj, kvankam zorge flikitaj kaj ŝtopitaj, estis malbele faritaj. La mizera socia medio el kiu li elvenis malestimata de ni. Lia

patrino, eta malgrasa virino, la vidvino de mallaborema drinkemulo, purigis butikojn por perlabori sian vivtenadon kaj tiun de sia filo. Vidante ŝin lavpurigi la ŝtuparojn, Chisholm difinis ŝin per la jena epigramo, iĝinta de tiam klasika por ni : "La Streket' patrino estas ŝtup-viŝistino".

Por iomete plialtigi la enspezojn de la familio, Streketo leviĝis ĉiutage je la kvina. Li kuris liveradi lakton. La longa vojo trairota kelkfoje malfruigis lian alvenon en la lernejo. Nuntempe ankoraŭ, kiam mi ĵetas rigardon malantaŭen, mi spirite revidas, fine de tiu longa galerio formita per la volbaĵoj de la jaroj pasintaj, la malaltkreskan kriplulon reĝvizaĝan kaj tremantan. Jen li, staranta meze en la klasĉambro, dum la lernejmastro, sadista brutalulo, eksplodigis mokridojn pro siaj sarkasmoj.

"Jen, jen, ĉu eble ? Ĉu ree vi malfruas ?"

"Jes, S-s-s-sinjoro".

"Kie do estis Lia Moŝto ? Sendube Li matenmanĝis kun Sinjoro Urbestro ?"

"N-n-n . . . "

Dum tiuj dolorigaj momentoj Streketo estis turmentita de balbutado, kio torturis lin. Estis neeble al li eligi eĉ unu silabon. Kaj la tuta klaso, legante el la rideto de la mastro malbravan konsenton, ridaĉis plengorĝe.

Se Streketo estus povinta lerte respondi, li estus estinta savita, ĉar en Skotlando oni pardonas ĉion al tiuj, kiuj havas viglan langon. Sed,

kvankam li elturniĝis sufiĉe bone je skribaj ekzamenoj, la buŝaj estis por li la fino de ĉio. Lia patrino malĝojis pro tio ĝismorte. Ŝi deziris arde ke ŝia filo sukcesu, precipe en certa rilato. Malriĉa, modesta, malestimata sed fanatika kia ŝi estis, projekto ambicia superregis ŝin: enirigi sian filon en la ordenojn de la anglikana eklezio de Skotlando. Senlima ambicio! Sed ŝi estis ĵurinta ĉu morti, ĉu vidi la efektivigon de tiu miraklo.

Streketo preferis la kamparon al la sufokaj religiaj ceremonioj. Li sopiris al la arbaroj, al la senlimaj herbejoj, kaj al la multvaria bestaro en ili vivanta. Se, hazarde dum liaj promenadoj, li renkontis malsanan aŭ vunditan beston li ne povis fari alie ol doni helpon. Li havis la povon sanigi. Fakte li pasie deziris fariĝi kuracisto.

Sed obeado estis parto de lia malobstina karaktero, kaj kiam li finis la lernej-jaron, estis por studi teologion.

Nur Dio scias kiel li sukcesis fari tion. Lia patrino ŝparadis ĝismizere. Ŝi fariĝis ankoraŭ pli malgrasa, sed brila flamo lumis en ŝiaj kavecaj okuloj.

Streketo sen entuziasmo, sed vigle kaj senhalte laboris. Longtempe pli frue ol oni kredis ebla, okazis do ke Streketo, dudekkvarjara, eniĝis en la ordenojn laŭ la ritoj de la anglikana eklezio de Skotlando.

En nia urbeto oni interesiĝis treege: la filo de dompurigistino iĝis pastro! Li estis proponita por la vikaria posteno en nia paroĥo, kie li faris provpredikon. Mankis eĉ ne unu fidelulo tiun ĉi tagon. Ĉiuj estis scivolemaj vidi kion faros la juna pastro. Streketo, kiu estis ripetinta sian predikon dum monatoj, supren-

iris al la predikejo, certa ne forgesi ĉe unu vorton de ĝi. Li ekparolis plene memcerta, kaj dum kelkaj momentoj ĉio iris bone. Sed subite li konsciiĝis pri tiu oceano da vizaĝoj al li levitaj, pri sia patrino kiu, sidanta en granda tualetto en la unua vico, rigardis al li ekstaze.

Tremo pro ekscito subite skuis lin kaj li sentis sian aplombon neniigi. Li hezitis, perdis la fadenon de sia prelego kaj ekbalbutis. Li sciis ke, ek de la momento kiam tiu malkapablo atakas lin, ĉio estas perdita. Li luktis kompatinde. Dum li serĉis vortojn, li vidis la maltrankviliĝon de la aŭdantaro, la signifoplenajn ridetojn. Li aŭdis eĉ subpremitan ridon. Li ree rigardis sian patrinon kaj ekhaltis. Estiĝis longa kaj peniga silento kiun Streketo fine interrompis per malaplomba tono, por anonci kanton.

Apenaŭ hejmenveninte, la patrino de Streketo estis forprenita de kompata apopleksio. Streketo forlasis Lewenford post la entombigo. Neniu sciemis kion li fariĝis. Markita per la ĝenerala malestimo, tiu malsukcesulo kvazaŭ estis elpelita por ĉiam.

Kelkajn jarojn poste mi sciiĝis ke li instruadas en malriĉa lernejo en la karbomineja regiono. Mi pensis momenton pri li kun la sekreta bedaŭro kiun oni sentas por senesperuloj, embuske atenditaj de malfeliĉo. Poste mi lin forgesis.

Kiam mi laboris en Edinburgo, Chisholm, fariĝinta helpa profesoro pri anatomio ĉe la universitato, vizitis min iun vesperon.

“Divenu kiu sekvas mian kurson pri sekcado?”, li diris al mi ridante. “Nia infantempa kunulo Punkto kaj Streketo!”

Fakte estis Streketo. Streketo, preskaŭ tridekjara, kiu ĵetis sin en la



medicinstudon. Li malbonfigure aspektis, kurbita, lamanta, meze de liaj junaj, ridemaj kundisĉiploj. Cetere neniu alparolis lin. Li loĝis en iu ĉambro en la malriĉula kvartalo. Pro lia modesta instruista salajro li estis devigata mem prepari siajn manĝojn. Dum la jaroj mi povis vidi lian porvivan batalon. Ĉio estis kontraŭ li: lia aĝo, lia stranga aspekto, la perfida balbutado kiu afliktis lin. Sed li daŭrigis antaŭeniri, nelacigeble, kun okuloj brilaj pro kuraĝo kaj espero, rifuzante konsideri la eblecon de malvenko.

Kvin jaroj pasis. Mi ree troviĝis en Londono. Mi estis perdinta Streketon el mia vido, sed ofte vidis Chisholm. Tiu ĉi estis envojiginta en la politikon dank' al lia belmieno kaj langofacileco. Li estiĝis parlamentano kaj eĉ ministro. Dum majo 1934 mi iris fiŝkapti kun li en Lennox en Altlandoj.

La manĝoj kiujn ni havis en la gastejo estis abomenaj kaj la dommastrino estis timiga virinaĉo. Tial ni ne tro bedaŭris vidi ŝin glitfali sur la ŝtonplankon de la trinkejo distordante la genuoston, du tagojn post nia alveno. Tamen, por trankviligi nian konsciencon kaj kvankam ni estis renegatoj de Eskulapo, ni oferis al ŝi siajn servojn. Ŝi rifuzis obstine dirante ke nur ŝia kuracisto kapablas flegi ŝin. Ŝi tiel emfaze laŭdis lian lertecon, lian scion kaj liajn altvalorajn farojn, ke Chisholm okulumis al mi kun rideto.

Unu horon poste, sian ilarujon enmane, la praktikisto alvenis. Kun la certeco de perfekta spertulo li trankviligis la malsanulinon per unu vorto. Per firma kaj certa mano li relokigis la eliĝintan oston. Nur tiam li sin turnis al ni.

“Sankta Dio!”, diris Chisholm per

mallaŭta voĉo, “Streketo!”

Fakte estis Streketo, sed ne plu la timema kaj balbutanta Streketo. Estis viro videble sukcesinta kaj memkonscia. Li rekonis nin senhezite kaj kore premante nian manon li invitis nin por vespermanĝi. Intertempe li urĝe devis viziti malsanulon.

Kiam ni eniris ĉe Streketo tiun vesperon, nia menso estis miksaĵo de antaŭtimo, eksciteco kaj dubo. Unue mi miris malkovrante ke Streketo estis edziĝinta. Lia edzino, beleta kaj freŝa kiel ŝia hejma kamparo, bonvenigis nin. Ĉar la doktoro (ŝi elparolis tiun titolon kun iom naiva respekto) estis ankoraŭ fortinita, ŝi suprenirigis nin por montri la infanojn: du knabinetojn ruĝvangajn kaj knabeton, jam endormiĝintajn. Ni estis mutaj pro surprizo. Malsupre Streketo atendis nin kun du invititoj. Serene li ludis sian dommastran rolon, kun digneco kaj senpene. Liaj amikoj estis viroj kviete seriozaj kaj ambaŭ evidentigis respekton por li. Per ili, multe pli ol per li mem, ni iĝis iom post iom informitaj pri li. Lia klientaro tre multenombra dise loĝis la kamparan regionon. Liaj malsanuloj estis terkulturistoj malparolemaj, prudentaj, silentemaj. Spite al tio li sukcesis akiri ilian konfidon. Kiam li trairis vilaĝon, la virinoj venis al li, montris siajn infanojn kaj konsultis lin sur la strato. Lieĉne pensis postuli de ili honorariojn. Li opiniis ke li enspezas sufiĉe da mono. Cetere je novjartago li trovis ĉiam monteton da donacoj sur la sojlo de lia pordo: anasojn, anserojn, dekduojn da freŝaj ovoĵoj, pro dankemo pro faritaj servoj de li jam forgesitaj.

Sed tio ne estis ĉio. Estis ankaŭ la longaj noktogardoj pasigitaj en iu

*Fino sur paĝo 312.*

# Belarta Konkurso 1955

**N**I invitas la sesan fojon niajn verkistojn kaj artistojn konkuri en la BELARTA KONKURSO. Internacia komisiono prijuĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj kaj la prezento de la gajnintaj verkoj okazos dum la 40-a Universala Kongreso en Bolonjo. Samloke okazos la prezentado de la ĉefpremia dramo. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj ankaŭ monpremion. La kvar branĉoj:

## LITERATURA SEKCIO

1. **Originala poezio** (maksimume 108 versoj per 1–3 poemoj).
2. **Tradukitaj poezio** (maksimume 108 versoj per 1–3 poemoj).
3. **Originala prozo** (ĉiu prozaĵo maksimume po proks. 12000 literoj).
4. **Originala drameto** (ludodaŭro maksimume 25 minutoj).

Oni rajtas partopreni per maksimume tri (antaŭe en presa formo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe la traduka branĉo oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj laŭeble aperos en la organo “Esperanto” kaj oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto. Skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon kaj sur aparta slipo la pseŭdonimon kun via vera nomo kaj

adreso, eventuale kun via kongresnumero aŭ kun membromarko de U.E.A. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj. Sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la traduka branĉo ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo.

## ĜENERALAJ REGULOJ POR PARTOPRENO

1. Ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 40-a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de U.E.A. (ĉu rekte, ĉu per “adopto”).

2. Sendu ĉion al la peranto, S-ro Ken Lawrence, 244 Quinton Road, Birmingham 17, Anglujo. La peranto havas la devon konservi la anonimecon de la partoprenanto.

3. La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 31-a de marto 1955 por la Literatura Sekcio.

4. Konkursa kotizo (sendepende, ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj en unu sekcio): por britoj: 1 ŝilingo 6 pencoj. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponojn: 3 respondkuponoj (maldekstre stampitaj) aŭ malpli laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas malpermesita, la partopreno estas senpaga.

*F. Szilágyi, Sekretario.*



# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo]: Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

## OFICIALA INFORMILO

N-ro 265

8an de oktobro 1954

**STATISTIKO.** Jen la stato de la membraro je la fino de septembro kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de septembro 1953:

|                     | 1953     | 1954     |
|---------------------|----------|----------|
| Asociaj membroj ..  | 7443     | 7782     |
| Individuaj membroj: |          |          |
| MJ .. ..            | 878      | 981      |
| MA .. ..            | 3854     | 3894     |
| MS .. ..            | 600      | 727      |
| Patronej .. ..      | 6        | 7        |
| DM .. ..            | 261      | 276      |
| HM .. ..            | 58       | 59       |
|                     | — 5657 — | — 5944 — |
|                     | 13100    | 13726    |

### NOVAJ PERANTOJ

**Irlando.** L. OhUiginn, 8 Cypress Road, Dublin. Tel: Dublin 880831.

**Kanado.** W. D. B. Hackett, 362 Soudan Avenue, Toronto 7. Tel: HU. '8-2811.

**Meksikio.** F. Azorin, Str. Guadalquivir 41—E, México D.F. Tel: 288952.

### DELEGITOJ

#### Brazilo

**Pindamonhangaba** (São Paulo). D: W. B. de Abreu, Av. Fernando Prestes 340. Tel: 106 kaj 64.

#### Britujo

**London S.E.3.** VD: S-ino D. M. Worcester, 104 Coleraine Road, Blackheath. Tel: Greenwich 2936.

#### Ĉeĥoslovakujo

**Martin.** D: E. V. Tvarozek, vydavatel'stvo Osveta n.p.

#### Danlando

**Kolding.** FD (Turismo): vakas.

#### Francujo

**Besancon** (Doubs). D: S-ino J. Trésorier, 7 rue des Iris, Cité de Palente.

**Lourdes** (Hte. Pyr.). FD (Hoteloj): vakas.  
**Nice** (Alpes Maritimes). D: R. Debernardi, 56 Bld. du Mont Boron (Villa Miranissa).

**Norrent-Fontes** (Pas-de-Calais). FD (Instruado): A. Contart, Route Nationale (N.43).

**Paris.** FD (Teatro Amatora): J. A. Rousseau, 64 Avenue de Châtillon, Paris 14.

**Tours** (Indre-et-Loire). D: E. Motillon, 10 Place du 8-Mai.

#### Germanujo

**Frankfurt M.** FD (Instruado): vakas.

**Kamen** (Westfalen. D: D-ro T. Henneberg, Markt 18. Tel: 471.

**Kaufbeuren.** D: vakas.

#### Indonezio

**Bandung** (Djawa). D: F-ino A. J. M. de Jager, Djalan Dago 92 (garage).

#### Italujo

**Tortona.** FD (Stenografio): vakas.

#### Maroko

**Mazagan.** D: vakas.

#### Nederlando

**Sappemeer** (Groningen). D: F-ino B. F. Kliphuis, Kees de Haanstraat 54.

#### Norvegujo

**Trondheim.** FD (Instruado): L. K. Hunnes, Reidulvs gt. 15. Tel: 26 246.

#### Svedujo

**Falköping** (Västergötland). D: G. H. Carlsson, Margaretagan 22. Tel: 113 34.

**Lindingö** (Uppland). D: vakas.

**Strängnäs** (Södermanland).. D: vakas.

### NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

te Strake-Leefers, S-ino H. E., Driebergen, Nederlando

de Cleene, S-ino P., Palmerston North, Novzelando.

### MEMBRO-SUBTENANTO 1954

734. Künzel, D-ro med. H., Bad Hersfeld, Germanujo

**DONACO al la Ĝenerala Kaso:** R. G. Robbins 8ŝ.

**DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo:** F. Szilágyi £1 10ŝ., E. Sonnenfeld £5 11ŝ., J. Nunez Regueiro £1 16ŝ., Argentina E-Ligo £5 11ŝ., S-ro Puel 10ŝ., Anonimulo 10ŝ., Itala Centro de Mondcivitanoj 14ŝ., Frostavallen £8 12ŝ. 6p., F-ino A. Solar

7ŝ. 6p., Abbé Coudray 16ŝ., S-ro Mage £1, F-ino B. Clavier £1, F-ino J. Carré £1, A. Courtis £1, D-ro F. Cinti 3ŝ. 4p., S-ino P. Taverna 3ŝ. 4p., S-ino R. Pacor 3ŝ. 4p., Esperanto-gr. Kaiserslautern 15ŝ. 6p., Esperanto-gr. Büsum 6ŝ. 6p., Fr. Kraus 12ŝ., J. Bauer £2 10ŝ., Esperanto-Ligo Berlin £1 11ŝ., Germana Esp.-Asocio £10, Centro Esp-ista de Santos £16 10ŝ., D-ro Carlos Resende £1 2ŝ., A. K. A. Costa £1 7ŝ. 6p., D-ro L. de Azeredo Coutinho £1 2ŝ., D-ro D. Teixeira 11ŝ., M. R. de Carvalho 5ŝ. 6p., F-ino M. Silva 11ŝ., F-ino J. Schembri 5ŝ. 6p., F-ino L. Schembri 5ŝ. 6p., D-ro F. J. S. Portugal 11ŝ., N. J. de Sisti 11ŝ., Hyzo G. dos Santos 11ŝ., A. de Castro 11ŝ., A. Rosa 11ŝ., Majoro R. P. de Moraes 11ŝ., K. Siedleski 11ŝ.

**Sumo ĝis 30.9.1954 : £1,138 8ŝ. 0p.**

**Sinceran dankon al ĉiu helpanto.**

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

**La kuracisto de Lennox : *fino.***

modesta loĝejo por eltiri malsanuloj elde la morto : infanon kiun difterio sufokis, kampariston subpremitan de pulminflamo, akuŝantan terkultur-istinon, ĉiujn tiujn geestulojn kiujn necesis rekuraĝigi, konsoli, revigligi, kaj rekonduki blindpalpe, manon en la mano, el la reĝolando de la ombroj. La saĝeco kaj la boneco de la doktoro etendiĝis tra la tuta lando. Li postulis nenion, ne ŝparis penojn kaj adoris tiun ĉi profesion al kiu li estis destinita, feliĉa pro la konkero de la koroj kiuj ĉirkaŭis lin. Li ne estis volinta kredi je malvenko kaj nun la venko estis lia.

Malfrue en la nokto post kiam ni forlasis la domon de la doktoro ni paŝadis ambaŭ tra la mallumo. Chisholm diris al mi iom kontraŭvole : “Nu ! Ŝajnas ke tiu malgranda viro sukcesis trovi sian vojon”.

Mi kredis aŭdi ian noton de spitemo en lia voĉo. Mi ne povis malhelpi min respondi :

“Kiu el ambaŭ vi preferus esti, Chisholm : vi mem, aŭ la kuracisto de Lennox ?”

“Iru al diablo !” li respondis al mi malafable, “Ĉu vi ne divenis tion ?”

Laŭ afabla permeso de *Readers Digest*.  
Tradukis Esperanto-grupo Mulhouse.

## Internacia Konkurso 1954



Vi vidas bildeton de la bela kaj impona flago de la Internacia Konkurso, pri kiu aperis informo en la numero de septembro (p. 231). Bedaŭrinde vi ne vidas la riĉajn kolorojn kaj silkon de la flago—verda, kun oraj literoj—kiu flirtos fiere ĉiujare ĉe la gajninto de la Konkurso.

### Stato je la 30a de septembro

|     | Lando          | Kvoto | Poentoj | %     |
|-----|----------------|-------|---------|-------|
| 1.  | Finnlando ..   | 2000  | 2770    | 138.5 |
| 2.  | Kanado ..      | 250   | 345     | 138.0 |
| 3.  | Sudafriko ..   | 300   | 395     | 131.6 |
| 4.  | Svislando ..   | 1500  | 1790    | 119.3 |
| 5.  | Maroko ..      | 700   | 805     | 115.0 |
| 6.  | Germanujo ..   | 3600  | 4135    | 114.7 |
| 7.  | Urugvajo ..    | 250   | 280     | 112.0 |
| 8.  | Nederlando ..  | 4600  | 5135    | 111.6 |
| 9.  | Danlando ..    | 2500  | 2775    | 111.0 |
| 10. | Jugoslavujo .. | 1600  | 1756    | 109.7 |
| 11. | Italujo ..     | 2900  | 3150    | 108.6 |
| 12. | Svedujo ..     | 5900  | 6260    | 106.1 |
| 13. | Portugalujo .. | 500   | 515     | 103.0 |
| 14. | Hispanujo ..   | 1600  | 1620    | 101.3 |
| 15. | Japanujo ..    | 900   | 905     | 100.6 |
| 16. | Francujo ..    | 5600  | 5552    | 99.1  |
| 17. | Aŭstrujo ..    | 850   | 830     | 97.6  |
| 18. | Usono ..       | 2300  | 2239    | 97.3  |
| 19. | Islando ..     | 350   | 335     | 95.7  |
| 20. | Britujo ..     | 9500  | 8863    | 94.3  |
| 21. | Aŭstralio ..   | 1000  | 900     | 90.0  |
| 22. | Kubo ..        | 250   | 220     | 88.0  |
| 23. | Belgujo ..     | 2300  | 1970    | 85.7  |
| 24. | Novzelando ..  | 850   | 776     | 91.2  |
| 25. | Izraelo ..     | 250   | 210     | 84.0  |
| 26. | Irlando ..     | 250   | 185     | 74.0  |
| 27. | Norvegujo ..   | 2300  | 1525    | 66.3  |
| 28. | Venezuelo ..   | 250   | 165     | 66.0  |
| 29. | Argentino ..   | 950   | 615     | 64.7  |
| 30. | Brazilo ..     | 6400  | 3965    | 61.9  |



# ANONCETOJ

*Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.*  
**Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.**  
**Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.**

**Grandan pacon** havas la amantoj de Via instruo ; Kaj ili ne falpuŝigas.

*Ps. 119. 165.*

**Em. Swedenborg**, sveda sciencisto kaj klarvidulo, rivelas en siaj religiaj verkoj la novan lumon pri la koncepto de Dio kaj postmorta vivo. Lia filozofio akordigas la religion kun la scienco kaj baziĝas je la spirita senco de S. Biblio. La traktatojn senpage vi ricevos, se eble kontraŭ 1 resp. kup., ĉe : Jan B. Vlach, Luzická 21, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakio.

**Novzelandano** deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Adreso : Harding Brown, 7 Scarborough Road, Sumner S.E.3, CANTERBURY, Novzelandano.

**Esperantaĵoj** (libroj, gazetoj k.a.). Mi vendas parton de mia kolekto trokreskinta. Seriozaj interesatoj skribu al Lippmann, 1021 East 14th Street, BROOKLYN 30, N.Y., Usono.

**Zorgistino bezonata** pri 10 junaj knaboj en sendependa lernejo; samideanino preferinda. Lokoj restas ankoraŭ por internuloj el eksterlando. Vidu jarlibron (unuan parton) pp. 45 kaj 126. Lernejestro, Nikune, Langley Grange, Ifield, CRAWLEY, Sussex, Anglujo.

**Lerneja klubo**, kiu organizas ekspozicion en Junio 1955, afable petas alsendon de ĉiaj esperantaĵoj. Adreso : "Elsje van Houweningen", Oldenbarneveltplein 12, AMSTERDAM, Nederlando.

**Mi serĉas kontakton** por interŝanĝo de naturaj fotoj (koloraj transparentoj). Ĉiuj landoj dezirataj. Skribu Esperante, Angle aŭ Germane. Adreso : Box 5312, G.P.O., SYDNEY, Aŭstralio.

**Volas korespondi** kun hispanaj gekolegoj, geinstruistoj Pystynen, Keskuskoulu, HAMINA, Finnlando.

**Abelkulturistoj.** Por organizi internacian abelkulturistan servon, sendu al mi adresojn de vialandaj abelkulturistoj. Detalojn mi skribos letere. Johano Tomán, Galagonya u. 2.II.2, BUDAPEST III, Hungarujo.

**Junulo korespondus** per belaj bildkartoj pri ĉio kaj interŝanĝus poŝtmarkojn ankaŭ memorigitajn Sicilion. Pietro Arrabito, via Stazzone 152, CATANIA, Italujo.

**Deziras korespondadon** kun Italoj pri turismo S-ro F. Hoekstra, Balijelaan 49-bis, UTRECHT, Nederlando.

**Popollerneja instruisto** pri metioj (ligna kaj metala) deziras interŝanĝi fakajn informojn kun samprofesiuloj. E. R. Holt, 61 Albany Road, CHATHAM, Anglujo.

**Mi deziras interŝanĝi** poŝtkartojn tutmonde. Robert Pommepuy, 9 rue Chaignaud, LIMOGES, Francujo.

**Sendu 50-100 pm.** el Anglujo, Francujo, Svisujo, Svedujo, Norvegujo kontraŭ analoga de Danujo. Bendtsen, Vólundsgade 26, KØBENHAVN, Danujo.

**35 gelernantoj deziras korespondi** pri naturismo kaj diversaj temoj. Ili organizos letervesperon mardon 14an de decembro 1954. Naturamikoj, ni kalkulas je via helpo. Asocio "Amo kaj Vivo", 36 rue de Lancry, PARIS 10, Francujo.

**Juna fraŭlino deziras korespondi** nur per bildkartoj kun ĉiuj landoj. Adreso : Ivete Costa Rosa, rua Dr. Esperidião 146, RIO PRETO, Minas Gerais, Brazilo.

**Deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn** kun ĉiuj landoj. W. Oliveira Leal, CARATINGA, Minas Gerais, Brazilo.

**20-jara studento deziras korespondi** kaj interŝanĝi poŝtkartojn, bildgazetojn, k.a. kun gejunuloj. S-ro Gabriel Minárik, Trnavská cesta 1077, SERED, Ĉeĥoslovakujo.

**Poŝtkartoj kun bildoj de Esperanto-poŝtmarkoj** haveblaj ĉe UEA, Rickmansworth po 4 por 3 respondkuponoj aŭ ŝil.

## Salutkartoj

**por Kristnasko kaj Novjaro**

9 diversaj koloraj poŝtkartoj,  
tre taŭgaj, 2ŝ. 8p. aŭ 8 rpk.  
afrankite.

**Mendu ĉe U.E.A.**

# NUN PRETA LA INTERNACIA LINGVO

## Faktoj pri Esperanto

**D-ro Ivo Lapenna**

Esperanto kiel solvo de la problemo de internacia lingvo

La Esperanto-organizaĵoj : iliaj celoj kaj laboro

U.E.A.—historio kaj laboro

*192 paĝoj, bone presita kaj bele bindita*

*Prezo : 10 ŝilingoj, afranko 6p.*

Libro nepre bezonata de ĉiu propagandisto, kaj efektive de ĉiu agema  
Esperantisto

**Universala Esperanto-Asocio,  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

## AKTUALAJ PROBLEMOJ de la NUNTEMPA INTERNACIA VIVO

**D-ro Ivo Lapenna**

La verko havas apartan intereson en  
la nuna tempo pro la Konferenco de  
UNESKO en Montevideo.

Prezo 12 ŝ'l. afranko 6p.

**Mendu ĉe U.E.A.  
aŭ enlanda libroservo**

## Ĉiu Esperantisto nepre volos posedi TRIBUTO AL NOBLA GENIULO

**de F. R. Jones**

Juvelo—ĉiu Esperantisto legu. Vere  
rekomendinda, traduko bona, stilo  
klara, preso kaj eksteraĵo plaĉa.

*Heroldo de Esperanto.*

Bele presita kaj bonlingva verko—  
vivanta kaj valora.

*Ferenc Szilágyi en Arbetar Esperantisten.*  
Tre altvalora, elokventa, pasia kaj  
nobla. Kara juvelo en nia biblioteko.

*Oomoto.*

Profunde impresis min—admirinda kaj  
leginda.

*W. A. Gething en British Esperantist.*  
Lukse broŝurita. Rekomendinda legaĵo.

*La Ponto.*

64 paĝoj en modela Esperanto.  
Eleganta, firma, kartonita kovrilo.

*Esperanto et Culture.*

Prezo 4 ŝil. anglaj, sendkosto 3p.

*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,  
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.**